


KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 374 (núm. 6 de la 6a època) DESEMBRE/DECEMBRO 2023

MARO ESTAS GUTARO



**Supervivència
de l'esperantisme
durant la dictadura
de Primo de Rivera**

➤ Redaktora saluto..... 3

CENTJARIĜO DE LA DIKTATURO DE PRIMO DE RIVERA
CENTENARI DE LA DICTADURA DE PRIMO DE RIVERA

➤ Supervivència de l'esperantisme durant la dictadura militar 4
 ➤ Supervivado de la esperantismo dum la milita diktaturo 5
 ➤ La diktaturo de Primo de Rivera 6
 ➤ Domènec Massacs: idealista de pensament i home d'acció contra el totalitarisme 9
 ➤ Acción Social Obrera (1918-1932) 12
 ➤ Alguns esperantistes destacats durant la dictadura de Primo de Rivera . 16

HISTORIO/MEMORO - HISTÒRIA/MEMÒRIA

➤ Saluton (Congrés Català d'Esperanto) 17
 ➤ Forpasis Carme Junyent i Figueras 20
 ➤ Forpasis Maria Ferigle Danti..... 20

LITERATURO - LITERATURA

➤ Pri nia kulturo 21
 ➤ Du sonetaroj – nia unika trezoro 24
 ➤ Poezia angulo. Biel Mesquida – Kiel la junaj maroj 27
 ➤ Poesia, sensibilitat i sorpresa. Poezio, sentemo kaj surprizo 28
 ➤ Home en ruïnes de Jaume Grau Casas: la restitució d'un testimoni excepcional 30

GRUP DE LINGÜISTES PER LA DIVERSITAT (GLIDI)

➤ Reviziinda ekzotismo 32

RACÓ DE L'APRENENT

➤ Angulo por eternaj komencantoj 34

ENTREVISTA

➤ Carol Forné: “Vull subratllar la importància de no perdre de vista la necessitat d'una perspectiva més global, més enllà de la llengua” 36

NIA AGADO – LES NOSTRES ENTITATS

➤ La marieta de la Lola ens porta de gira!! 40
 ➤ Tarragona Esperanto..... 41
 ➤ Budoj de KEA..... 42
 ➤ Lasta agado de KEJ..... 43

VILAĜO ESPERANTO

➤ Valoroj de Esperanto..... 47

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

revuo-ke@esperanto.cat

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
 Apartat 1008 - 08204 Sabadell
 Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell
 www.esperanto.cat
 info@esperanto.cat

Consell de redacció: Pere Fornells, Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Xavier Margais, Pedro Martín Burutxaga, Óscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Hèctor Alòs (esperanto), Anna Maria Muñoz (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO
KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

President/Prezidanto: Òscar Puig
 Vicepresidenta /Vicprezidanto: Sandra Vives,
 Secretària/Sekretario: Maria Sánchez,
 Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas -
 Vocals/Voĉdonantoj: Alfons Tur, Carles Vela,
 Enric Pineda, Ferriol Macip, Lluís de Gibert,
 Mon Cardona, Sebastià Ribes, Sílvia Soler,
 Representant/Reprezentanto de KEJ:
 Jordi Calafí

JOVENTUT CATALANA D'ESPERANTO/
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

President/Prezidanto: Òscar Hernández,
 Vicepresident - Vicprezidanto: Joan Visa,
 Tresorer/Kasisto: Jordi Calafí,
 Secretari General/Ĝenerala Sekretario:
 Isaac Giménez, Representant a TEJO/
 Komitatano A en TEJO: Lucía M. Fernández.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA. Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se'n reconegui explícitament els autors, i l'Associació Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
 08004 Barcelona



Foto de portada: Congrés Català d'Esperanto, Girona 1921.

Fotògraf: Valentí Fargnoli Annetta.

Foto de la kovrilo: Kataluna Kongreso de Esperanto, Girono 1921.

Fotisto Valentí Fargnoli Annetta.

REDAKTORA SALUTO



Pere Fornells

No sé si la història es repeteix. Potser és com les nostres vides, que mai no n'hi ha dues d'iguals, però ben mirat tots som humans: al final les coses que ens passen entren dins d'una gamma d'experiències i tot sovint s'assemblen. Així, tot el que ens passa és nou i genuí, però inevitablement sempre li ha passat abans a algú, ni que sigui amb tot de matisos únics cada vegada. Per això de les experiències passades sempre se'n poden treure bones lliçons. En aquest número fem una petita mirada a uns esdeveniments que van marcar molt el segle passat al nostre país. Són part important del fil conductor que ens ha dut fins on som ara. Veiem com el món que ens envolta, amb el pas del temps, pot assemblar-se molt i ser molt diferent a la vegada.

Enguany ens ha deixat la Carme Junyent, lingüista admirada, treballadora incansable, entre moltes altres coses, en la defensa de la diversitat lingüística, i compromesa amb la societat des del seu camp de coneixement. Sempre va col·laborar amablement amb KEA, i també amb aquesta revista en particular, quan se li va demanar. És de justícia dedicar-li un record i homenatge en aquestes pàgines.

Em plau molt anunciar una nova secció de la revista. D'ara endavant publicarem a cada número un article del Grup de Lingüistes per la Diversitat (GLiDi) traduït a l'esperanto. Estem molt agraïts tant a la gent del GLiDi com a *Vilaweb*, on aquests articles es publiquen originalment, per haver-nos donat generosament el permís de difondre'ls aquí. Encetem la col·lecció amb l'article «Reviziinda ekzotismo».

Com podreu veure, KEA i KEJ no s'aturen. Teniu l'oportunitat de veure algunes de les coses que s'han fet aquests darrers mesos. Si no els coneixíeu, ara ja sabreu qui són i què fan els nostres companys de Tarragona. I, de cara al 2024, ve un any ple de trobades amb un nou RenKEJtiĝo i el proper Kataluna Kongreso. Que en gaudiu molt! ■

Mi ne scias, ĉu historio ripetigas. Eble ĝi estas kiel niaj vivoj. Neniam du vivoj egalas, sed finfine ni ĉiuj estas homoj: la aferoj, kiuj okazas al ni, apartenas al gamo de spertoj, kaj ofte similas inter si. Do, ĉio, kio okazas al ni, estas nova kaj originala, sed neeviteble ĉiam iu jam travivis tion, eĉ se kun pluraj unikaj nuancoj ĉiuokaze. Tial el pasintaj spertoj ĉiam eblas eltiri bonajn lecionojn. En tiu ĉi numero ni faras malgrandan rigardon al eventoj, kiuj forte influis nian landon dum la pasinta jarcento. Ili estas gravaj partoj de la fadeno, kiu kondukis nin al nia nuntempa situacio. Ni vidas, kiel nia ĉirkaŭa mondo, kun la pasado de la tempo, povas samtempe esti tre simila kaj tre malsama al la pasinto.

Ĉi-jare forpasis Carme Junyent. Ŝi estis admirata lingvistino senlace laborema, inter multaj aliaj aferoj, por la defendo de la lingva diverseco. Ŝi ankaŭ socie engaĝiĝis surbaze de siaj fakaj konoj. Ŝi ĉiam afable kunlaboris kun KEA, kaj ankaŭ specife kun tiu ĉi revuo, kiam oni petis tion de ŝi. Justas memori kaj omaĝi ŝin en tiuj ĉi paĝoj.

Kun plezuro mi anoncas novan sektion de la revuo. De nun, en ĉiu numero ni publikigos esperantigitan artikolon de la Grupo de Lingvistoj por la Diverseco (GLiDi). Ni tre dankas, kaj al GLiDi kaj al *Vilaweb*, kie tiuj artikoloj originale aperas, pro ilia afabla permeso disvastigi tiujn artikolojn ĉi tie. Ni komencas la kolekton per la artikolo «Reviziinda ekzotismo».

Kiel vi vidos, KEA kaj KEJ ne haltas. Vi havas la eblon legi pri kelkaj el la aferoj, kiuj estis faritaj dum la lastaj monatoj. Se vi ne konis niajn kolegojn en Taragono, nun vi ekscios, kiuj ili estas kaj kion ili faras. Kaj, rigarde al 2024, venas jaro plena de renkontiĝoj, kun nova RenKEJtiĝo kaj la venonta Kataluna Kongreso. Ĝuu ilin multe! ■

SUPERVIVÈNCIA DE L'ESPERANTISME DURANT LA DICTADURA MILITAR

Xavier Margais Basi

Historiador

Amb l'excepció dels cinc anys efectius de la II República més altres tres de guerra, l'estat espanyol va ser regit per dictadures militars, del 1923 al 1978. La primera de les dues dictadures fou proclamada pel general Miguel Primo de Rivera, amb l'objectiu de desterrar la cultura política dins l'Estat i baratar-la pels valors que considerava propis de la milícia. Aquell assaig va estar en vigor des l'any 1923 al 1931, i per la seva gènesi absolutament contrària a qualsevol tipus d'acció política va entrar en conflicte amb el moviment esperantista a la banda espanyola dels Països Catalans.

Sembla que al rei Alfons XIII li va venir bé la proclamació d'una dictadura militar. Com a cap de l'estat la va acceptar i conseqüentment el general Miguel Primo de Rivera va suspendre la constitució i va eliminar les corts espanyoles. També va suspendre els governs civils i va substituir els ajuntaments per juntes rectores i a tots els partits judicials imposà delegats governamentals. El dictador abominava la política, però va crear un partit únic: la *Unión Patriótica* i per mantenir l'ordre va estendre el sometent a totes les províncies com a braç armat del partit únic. Anticatalanista furibund, en una de les seves primeres disposicions, va anul·lar la Mancomunitat de Catalunya, finalment va ordenar la censura prèvia a tota la premsa, afer del qual no es va

escapar *Kataluna Esperantisto* i que ho va superar gràcies a la bona disposició d'un policia esperantista.

El dictador s'abraonà contra tot tipus d'activitat política i contra l'anarcosindicalisme. Aquesta endemesa va tenir importants conseqüències dins el moviment esperantista català. La més greu fou la clausura i tancament de l'Ateneu Enciclopèdic Popular que era on KEF, i el grup *Semo*, tenien la pròpia seu. Aquesta era en una petita estança que generosament l'Ateneu cedia per tal que la Federació pogués organitzar les seves activitats, i on s'hi componia *Kataluna Esperantisto*. De manera, que de sobte, el nucli dur del moviment esperantista català va quedar-se al carrer i sense perspectives de corregir-ho.

Així van descriure a *Kataluna Esperantisto*, de desembre de 1923 en la pàgina 128, la crítica situació: *...Amb molta tristesa anunciem als nostres lectors, els esperantistes catalans i alguns estimats amics estrangers, que aquest número de la nostra revista és el darrer...* Efectivament, a la Federació Catalana d'Esperantistes no li va tocar altre remei que assumir les disposicions de les noves autoritats sobretot en relació a la revista, però pel que fa a la resta de les activitats, com les d'organització dels congressos i dels Jocs Florals Internacionals, van maldar per continuar-les duent a terme. Així, una nova junta directi-



Girona, 1921.

va al davant de la qual hi havia Delfi Dalmau, permeté no només superar l'endemesa sinó que plantà cara a base d'augmentar les activitats.

En el número de novembre-desembre de *Kataluna Esperantisto* de 1924, feien conèixer els plans de la nova junta i sobre les obligades disposicions antipolítiques declaraven: *...KATALUNA per a nosaltres no ha de tenir cap sentit polític, sinó lingüístic, perquè el nostre problema d'esperantistes avui no és polític, sinó lingüístic. I serà una bella prova d'aquesta orientació i fidelitat la celebració a Mallorca, València i Rosselló de vinents Congressos de la Kataluna Esperantista Federació.*

Així, un esperantisme dirigit per la Federació Catalana d'Esperantistes, duent a terme activitats exclusivament de caire lingüístic, es va trobar a si mateix tot organitzant congressos i Jocs Florals Internacionals pels territoris on la llengua catalana era natural: 1925, Palma; 1927, Sóller i 1928 a Vinaròs. Res de política, tal com volia el dictador militar. ■

SUPERVIVADO DE LA ESPERANTISMO DUM LA MILITA DIKTATURO

Xavier Margais Basi

Historiisto

La hispana ŝtato estis regita de militaj diktaturoj de 1923 ĝis 1978, krom la kvin efektivaj jaroj de la Dua Respubliko plus tri militaj jaroj. La unua el la du diktaturoj estis proklamita de generalo Miguel Primo de Rivera. Li celis forigi la politikan kulturon en la ŝtato kaj anstataŭigi ĝin per la tipaj militistaj valoroj. Tiu provo efektiviĝis de 1923 ĝis 1931, kaj pro sia karaktero absolute kontraŭa al iu ajn politika agado, ĝi ekkonfliktis kun la esperantista movado en la hispania flanko de Kataluna Landaro.

Ŝajnas, ke reĝo Alfonso XIII ŝatis la proklamon de militista diktaturo. Kiel ŝtatestro li akceptis ĝin kaj sekve generalo Miguel Primo de Rivera suspendis la konstitucion kaj likvidis la hispanan parlamenton. Li ankaŭ suspendis la civilajn provincajn prefektejojn, anstataŭigis la magistratojn per nomumitaj estraroj kaj trudis registarajn delegitojn en ĉiujn juĝodistriktojn. La diktatoro abomenis politikon, tamen li kreis la solan permesitan partion: la *Unión Patriótica*, kaj por konservi la ordon li plilarĝigis la milicon al ĉiuj provincoj kiel armitan brakon de la ununura partio. Ĝisosta kontraŭkatalunisto, en unu el siaj unuaj dispozicioj, li nuligis la *Mancomunitat de Catalunya*¹. Fine li ordonis la cenzuron de la tuta

1 Duonaŭtonoma registaro de Katalunio je la komenco de la 20a jarcento

gazetaro, afero el kiu *Kataluna Esperantisto* ne eskapis kaj kiun ĝi venkis dank' al la helpemo de esperantista policisto.

La diktatoro ĵetis sin kontraŭ ĉian politikan agadon kaj kontraŭ la anarki-sindikatismon. Tiuj ĉi misfarojn havis gravajn sekvojn en la kataluna esperantista movado. La plej grava estis la fermo de la *Ateneu Enciclopèdic Popular*, kie la Kataluna Esperantista Federacio kaj la grupo *Semo* havis siajn sidejojn. Tio estis en ĉambreto, kiun la Ateneo malavare cedis por ke la Federacio organizu sian agadon, kaj kie estis redaktita *Kataluna Esperantisto*. Do, subite la kerno de la kataluna esperantista movado estis elpelita surstraten kaj sen perspektivoj por solvi tiun situacion.

Tiel oni priskribis la kritikan situacion en la numero de *Kataluna Esperantisto* de decembro 1923, sur la paĝo 128: "Kun granda ĉagreno ni sciigas al niaj legantoj, la katalunaj esperantistoj kaj kelke da karegaj eksterlandaj amikoj, ke ĉi tiu numero de nia revuo estas la lasta...". Efektive, la Kataluna Esperantista Federacio ne havis alian eblon ol akcepti la postulojn de la novaj aŭtoritatoj, precipe rilate al la revuo, tamen koncerne la ceterajn agadojn, kiel la organizadon de kongresoj kaj de la Internaciaj Floraj Ludoj, ili forte batalis por daŭrigi ilin. Tiel, la nova estraro gvidata de Delfi



Ĝirono, 1921.

Dalmáu sukcesis dank'al sia firmeco ne nur venki la problemojn sed ankaŭ spiti ilin pere de kreskanta aktiveco.

En la numero de novembro-decembro de *Kataluna Esperantisto* en 1924 oni anoncis la planojn de la nova estraro kaj deklaris pri la devigaj kontraŭpolitikaj dispozicioj: "...KATALUNA" por ni devas havi nenion politikan signifon, sed lingvan, ĉar nia problemoj kiel esperantistoj hodiaŭ ne estas politika, sed lingva. Kaj estos belega pruvo de tiu ĉi orientiĝo kaj fideleco la okazigo en Majorko, Valencio kaj Rusiljono de la venontaj Kongresoj de la Kataluna Esperantista Federacio.

Tiel la esperantismo gvidata de Kataluna Esperantista Federacio, organizanta aktivaĵojn kun ekskluzive lingva karaktero, trovis sin organizanta kongresojn kaj Internaciajn Florajn Ludojn en la teritorioj, kie la kataluna lingvo estis natura: 1925, Palma; 1927, Sóller kaj 1928 en Vinaròs. Neniom da politiko, kiel volis la milita diktatoro. ■

LA DIKTATURO DE PRIMO DE RIVERA

José María Salguero

Instruisto de la hispanaj lingvo kaj literaturo

La diktaturo de Primo de Rivera (13a de septembro 1923 ĝis la 28a de januaro 1930) estis politika reago al forta krizo kiun suferis diversaj sektoroj de la monarkia reĝimo, ne nur la armeo, kiu ja suferis fortajn tensiojn pro diversaj kialoj. Ĉiuokaze la politikan puĉon faris persone Miguel Primo de Rivera, unu el la ĉefaj militestroj kun politikaj postenoj. Sed li agis tute interkonsente kun la monarko Alfonso la 13a, avo de la nune emerita reĝo, kies personaj kaj politikaj epizodoj nepre rememoris tiujn de lia avo.

La plej grava krizo estis longa konflikto inter la laborista movado (kaj industria kaj kamparana) kaj la burĝaro (ĉefe kataluna kaj andaluza), konflikto kiu eble pliakriĝis ekde la Tragedia Semajno de Barcelono, kaj kiun akcelis la prez-altigo dum la Unua Mondmilito, la malsukceso de la striko de 1917, la deviga amas-

sendado de junaj laboristoj al la maroka buĉejo (kio respondis nur al intereso de la hispanaj kapitalistoj), kaj finfine la novaĵoj pri la unua laborista revolucio okazinta en Rusio. En tiu kunteksto, partoj de la armeo estis pretaj interveni por defendi la reĝimon aŭ, pli ĝuste, por eviti, ke la kreskiĝanta plurflanka opozicio renversu la situacion. Estis jam ekzemploj de diktatoraj reĝimoj, kun militistaj nuancoj, en orienta kaj sud-orienta Eŭropo, nome en Pollando, Hungario, Grekio kaj Jugoslavio, enkalkulante ankaŭ la prenon de la potenco fare de la itala faŝismo kiu montris pli specifajn trajtojn.

Tiuj partoj de la armeo jam estis intervenintaj en lokaj konfliktoj, ekzemple en Katalunio, sed precipe komplike kun aliaj grupoj similtendencaj, kiel koruptaj policianoj je la servo de la kataluna burĝaro kontraŭ la anarksindikatismaj laboris-

toj ktp. Interne de la armeo estis du aferoj, kiuj komplikis ties situacion. Unuflanke, en la kadro de la maroka milito, okazis kontraŭstaroj de oficiroj malkontentaj pro la promociosistemo: fakte iuj preferis konsideron de batalmeritoj, dum aliaj preferis antikvecon kiel levilon. Ĉiuj defendis siajn personajn interesojn.

Aliflanke, en 1921, la Rif-ribelestro Abd-el-Krim venkegis sur la hispana armeo en Annual. La parlamento nombris 13 363 mortintojn kaj malaperintojn kontraŭ ĉirkaŭ 1000 mortintajn ribelulojn. Hispanio perdis enorman kvanton da militmaterialo, kiun poste oni uzos kontraŭ ĝi. La hispana militministro ordonis inspektadon. Sub la gvido de Juan Picasso González, komisiono alvenis al la konkludo, ke okazis multaj milit-strategiaj eraroj, sed oni ne kulpigis mem la reĝon Alfonso la 13a, kvankam diversaj fontoj montris, ke la reĝo fakte



Miguel Primo de Rivera en Donostio (Eŭskio) en 1928.

kuraĝigis la generalon Silvestre al la katastrofa ofensivo. La kresko de la kritikoj subfosis la aŭtoritaton de la monarkio. Por eviti, ke la inspektado kaj la postulo de respondeco atingu la monarkion mem, la reĝo permesis la militistan puĉon de la generalo Miguel Primo de Rivera, kiu dissolvis la parlamenton, la registaron, la agadon de la politikaj partioj kaj de sindikatoj kaj nuligis la Konstitucion kaj la magistratojn.

La novan registaron formis nur generaloj nomumitaj de Primo mem. Iel oni estis imitanta tion kion faris Mussolini en Italio unu jaron antaŭe, kun la diferenco ke Mussolini devenis de ia maldekstreca sinteno, dum Primo reprezentis la aliancon inter la arma hierarkio kaj la andaluzaj terposedantaro. Unu el unuaj decidoj estis la malpermeso de region-nacisma agado, ekzemple en Katalunio kaj Eŭskio. En 1925 oni inkludis civilajn

ministrojn, sed ankoraŭ ene de la diktatura kadro, eksterkonstitucie. Pri la laborista movado, la diktaturo sukcesis allogi sektoron de la socialisma partio (inkluzive de Largo Caballero) kiu kunlaboris kun la reĝimo, dum alia sektoro de la partio (Indalecio Prieto) ne akceptis tiujn demarŝojn. Ĉe la CNT, la traktado iĝis rekta persekutado kaj subpremado: oni fermis la sindikatejojn, oni malpermesis strikojn, kaj oni enkarcerigis aktivulojn, dum frakcioj de la PSOE profitis de avantaĝoj pro la kunlaborado kaj ankaŭ de la subpremado mem de la rivala liberecana movado.

Oni supozis, ke la nova reĝimo estas batalanta kontraŭ koruptado kaj kacakismo, sed tio okazis nur teorie: en la praktiko, se oni elpostenigis koruptitojn, tiuj estis anstataŭitaj de partianoj de la diktatura reĝimo. Tio okazis ekzemple en la niveloj municipaj kaj juĝistaj. En 1924 la reĝimo kreis

sian propran partion nome “Unión Patriótica” (Patriota Unio), kun fortaj referencoj al la katolika tradicio kaj al hispanisma ŝovinismo, kaj plene kontraŭ la restarigo de la universala vira voĉdonrajto. Multaj iamaj kacakoj aliĝis al tiu partio, kaj aparte tiuj de la provinco Kadizo, devenloko de Primo mem. En Katalunio, dekomence kelkaj dekstraj grupoj favoris la alvenon de la diktaturo (ĉefe kontraŭ la laborista movado), sed iom post iom la reĝimo plialtigis sian nivelon de kontraŭkatalunismo, kaj la konfliktoj (aŭ almenaŭ la opozicio) pliakriĝis.

En Maroko, oni ekigis ioman retreton kaj bremsadon de la milito, kio rezultis en pluaj venkoj de la ribeluloj, malkontento de la afrikistaj oficiroj (kiel Francisco Franco) kaj cenzuro. Tamen en 1924 oni daŭrigis la militoperacojn kun aprobo de la afrikistaj oficiroj, sed la milito

daŭre estis malsukcesa por la hispana armeo. Nur eraro de la ribeluloj en 1925, kiam ili atakis francajn soldatojn, kio puŝis Francion en la militon, renversis la situacion favore al Hispanio. La franc-hispana elŝipigo de Alhucemas en septembro 1925 surprizis la ribelulojn kaj estis sukceso por Primo; en aprilo 1926 Abdel-Krim kapitulacis, kaj sekvajare la hispana Maroko estis repacigita, dum la afrikistaj oficiroj kontentiĝis por la momento, kaj la aferon de la respondecoj pri la iama malvenko oni forgesis. Franco siaflanke rajtis ĝui rapidegan promocion, kio gravos post kelkaj jaroj, kiam la promoci-afero kreos daŭrajn malkonsentojn inter militistestroj.

Post tiu sukceso kaj la eniro de civilaj gravuloj en la hierarkion de la reĝimo, la diktaturo iĝis malpli militema kaj militista kaj plifirmiĝis kiel aŭtoritativa diktaturo iom pli je la stilo de la itala faŝismo (Mussolini mem ne estis militisto). En septembro 1927 oni kreis Konsilian Asembleon (neelektitan parlamenton). Sed la laŭsektora kompono de tiu Asembleo kaŭzis disputojn. La socialistoj dekomence ne akceptis partopreni, sed Primo favoris denove la partoprenadon de la kunlaborema frakcio de Largo kaj denove okazis la disiĝo inter la du flankoj de la partio (tio parte daŭros dum la Hispana Enlanda Milito kaj la ekzilo kaj iel fakte ĝis la tiel nomata hispana Transiro al la demokratio).

Spite la politikan stagnon, la ekonomia progreso evidentiĝis pere de la ŝtata intervenismo (oni kreis monopolojn en fervojoj, nafto, telefono ktp.), kaj de la malpermeso de la laborisma aktiveco. Ĉefaj antaŭeniroj okazis en publikaj vorkoj, ekzemple fervojoj kaj ŝoseoj, kio aparte utilis kiel propagando de la reĝimo.

Tamen ĉirkaŭ 1928 la diktaturo ekperdis subtenojn kaj oni antaŭvidis finon. Opoziciis katalunismaj grupoj, entreprenistaj grupoj (malkontentaj pro la progreso de la socialista sindikato UGT, kiu profitis de la subpremado de la rivala CNT), universitanoj kaj intelektuloj (estas konataj

la epizodoj de Miguel de Unamuno, unue elpostenigita kiel rektoro de la Universitato de Salamanko kaj poste ekzilita en Fuerteventura; Valle-Inclán, primokinta ebrian generalon; Blasco Ibáñez, ekzilita en Francio ktp.), studentoj, liberaluloj (kiuj vidis, ke la diktaturo, kiu ekis kiel provizora, minacis per eterniĝo) kaj finfine ankaŭ eĉ parto de la armeo (artilerianoj) malkontentis pri la promociosistemo. Tio rezultis en neantaŭvidebla situacio: la reĝo subtenis la artilerianojn, sed Primo insistis pri sia kontrolo de la armeo. La reĝo ekdistanciĝis de Primo, sed la falo de tiu ĉi faligos ankaŭ la reĝon, kiu ĉiam subtenis lin kaj lian kontraŭdemokratian sintenon. Aperis puĉoklopodoj el diversaj sektoroj kaj la respublikismaj partioj plifortiĝis. CNT siaflanke restariĝis, dum la socialistoj ekforlasis la diktaturan reĝimon.

Unua puĉo estis la tiel nomata “Sanjuanada” (ĉar ĝi estis planita por la 24a de junio, tago de populara festo de Sankta Johano, 1926). En tiu konspiro partoprenis la liberalaj generaloj Weyler kaj Aguilera, kaj elstaraj gravuloj kaj iamaj politikistoj, kiel Melquiades Álvarez. La dua puĉo okazis en januaro 1929 en Valencio kaj ĝia ĉefa figuro estis konservatista politikisto José Sánchez Guerra, kaj en tiu okazo ludis rolon malkontentaj artilerianoj. Inter ambaŭ klopodoj okazis ankaŭ la nomita komploto de Prats de Molló, nome la planita invado de Hispanio el la franca Katalunio estrita de la katalunisma politikisto Francesc Macià kaj lia partio “Estat Català”, en kiu ŝajne kunlaboris eĉ anarkisindikataj katalunoj de la CNT. La organizo de puĉo estis nova rimedo ne uzita dum jardekoj, sed kiu estis enmodigita fare de la diktaturo mem, kio havos terurajn sekvojn post malmultaj jaroj.

La politika scenejo estis tute nova. La iamaj partioj (liberalaj kaj konservativaj), kiuj regadis laŭvice antaŭ la diktaturo, en sia iama konsisto estis malaperintaj. Iliaj supervivantaj politikistoj sekvis diversajn vojojn: kelkaj aliĝis al la partio de Primo, nome “Union Patriótica”, sed la pli-

multo, kiel Sánchez Guerra kaj Manuel de Burgos y Mazo (konservativuloj) kaj Santiago Alba (liberalulo), aliĝis al la Konstitucia Bloko fondita de la reformisto Melquiades Álvarez, kiu, konscia pri la epokoŝanĝo, postulis la abdikon de Alfonso la 13a kaj la kunvokon de Konstituci-fara Asembleo. Aliaj eĉ pli maldekstriĝis, malferme transirante al la respublikana tendaro, kiel Niceto Alcalá-Zamora kaj Miguel Maura Gamazo, kiuj fondis dekstran respublikisman partion, nome “Derecha Liberal Republicana”. Tiu ĉi ne estis la sola por-respublika partio, tiam fondita aŭ plifortiĝita. Menciindas ankaŭ “Acción Republicana”, de Manuel Azaña (iama membro de la “Partido Reformista” de Melquiades Álvarez), la “Partido Republicano Radical” de Alejandro Lerroux, la “Partido Republicano Radical-Socialista” de Marcelino Domingo kaj Álvaro de Albornoz, la “Partido Republicano Democrático Federal”, kaj la “Partit Republicà Català” de Lluís Companys. Ĉiuj ludos gravan rolon en la faligo de la diktaturo, de la sekva transira registaro kaj de la proklamo de la Respubliko.

Krome Primo grave malsaniĝis je diabeto (malicaj fontoj rakontas, ke fakte li delonge drinkemis). Inter fino de 1929 kaj komenco de 1930 ĉio akceliĝis: Primo klopodis por ŝanĝi la assemblean sistemon; konstatis, ke li ne havis la subtenon de la armeo; rezignis antaŭ la monarko; kaj la reĝo nomumis la generalon Berenguer, por tio kion oni nomis “Dictablanda” (“diktamolo”), nome transira reĝimo al konstituciismo, sed fakte ĉio plirapidiĝis. La opozicio plifortiĝis, venis pliaj puĉoklopodoj, municipaj elektoj kaj finfine respubliko, sed tio estas alia rakonto.

Primo siaflanke ekziliĝis kaj mortis post nelonge en Parizo. Lia filo José Antonio vivis tiun lastan momenton kun sento, kiu kristaliĝos en la kreado de vera faŝisma partio, nome Falange Española. Ĝi ludos ŝlosilan rolon en la Hispana Enlanda Milito, okazonta post ses jaroj, kaj iel eĉ dum kvar pliaj jardekoj, sed ankaŭ tio estas alia rakonto. ■

DOMÈNEC MASSACS: IDEALISTA DE PENSAMENT I HOME D'ACCIÓ CONTRA EL TOTALITARISME



Dolors Marin Silvestre

Doctora en Història i professora

Després del trist i victimari període del pistolisme a Barcelona que va delmar la força obrera dels anarcosindicalistes de la Confederació Nacional del Treball, es va instaurar la sinistra dictadura del militar Primo de Rivera que va seguir en les seves accions en contra dels obrers organitzats de Catalunya. Les presons es van omplir del que s'anomenaven “presos governatius”, homes i dones que eren empresonats sense causa prèvia, sense proves i que podien passar anys a les presons de tot l'estat.

Immediatament la CNT fou posada fora de la llei i els seus militants perseguits, empresonats o investigats. Molts joves en edat militar van optar per l'exili cap a França². Molts esperantistes van col·laborar en aquestes xarxes d'evasió i foren

companys de lluites dels anarquistes que seguien defensant-se contra una patronal intransigent, una classe política egoista i una església que s'aliava amb els militars i la reacció en contra dels treballadors i treballadores que volien millores polítiques, econòmiques, culturals i socials. Els grans anys de l'esperantisme català coincideixen amb l'esclat dels ateneus de barri que en períodes de clandestinitat forçada de les associacions obreres les van substituir com a nuclis de relació i acció. Foren anys de lectures, reflexió i acció de petita intensitat, Josep Peirats els defineix com anys de formació³.

Domènec Massacs (1891-1965) fou un dels lluitadors socials més estimats dels catalans dels anys més difícils, el pistolisme i la dictadura de Primo⁴. Com molt bé ens relatà Ramon Fernández Jurado (1914-1984), fou Massacs qui l'encaminà

2 Els militants de l'Ateneu naturista Eclèctic del barri del Clot organitzaven excursions. En concret els del grup “Sol y Vida”, actius idistes i que dissertaven a la premsa anarquista sobre la conveniència d'aquesta llengua planificada sobre l'esperanto. Sobre tot això, a partir d'entrevistes amb els protagonistes, vegeu: Dolors Marin Silvestre (1995): *De la llibertat per conèixer al coneixement de la llibertat*. Tesi doctoral Universitat de Barcelona.

3 Entrevista amb Dolors Marin Silvestre, L'Hospitalet (1995)

4 Unes notes biogràfiques sobre Massacs i Paco kaj Amo, a Marin Silvestre, Dolors (2003): *La Barcelona rebelde: guia de una ciudad silenciada*. Barcelona: Octaedro; (2010): *Anarquistas. Cien años de movimiento libertario en España*. Barcelona: Ariel. Sovint el seu nom apareix a vegades amb una sola s: Masacs.

”

Molts esperantistes van col·laborar en aquestes xarxes d'evasió i foren companys de lluites dels anarquistes

”

Domènec Massacs fou un dels lluitadors socials més estimats dels catalans dels anys més difícils, el pistolisme i la dictadura de Primo

dins dels camins de l'esperantisme i la lluita de classes⁵. En aquells anys Massacs vivia al carrer Joan Blanques relacionant-se amb els esperantistes graciencs del Paco kaj Amo (amb Salvador Alberich i els seus germans, amb qui compartien militància anarquista). En Saljo, Salvador Alberich Jofré, és encara un dels grans desconeguts de la nostra història obrera i combativa⁶.

Massacs era fill d'un fuster de La Maquinista Terrestre y Marítima del barri portuari de La Barceloneta, on va néixer. La seva mare treballava de planxadora. Ell va començar a treballar als deu anys a la casa Henrichs i Cia, on va entrar en contacte amb les arts gràfiques. Podem afirmar, sens cap mena de dubte, que fou un dels animadors del grup Paco kaj Amo (1907-1939). El grup va aconseguir publicar un butlletí mensual des de gener de 1920 fins setembre de 1938⁷.

5 Fernández Jurado, Ramon (1987): *Memòries d'un militant obrer: 1930-1942*. Barcelona: Hacer, i el manuscrit (s/d): *Escrits Graciencs: Amb mango, ferret i ploma*. Barcelona.

6 Vam poder establir la seva identitat gràcies als seus germans Tomàs, Josep i Frederic Alberich Jofré, actius esperantistes i bons narradors de les seves vivències juvenils al Paco.

7 És el darrer que hem localitzat.

Expliquen que el 1906 els fundadors es reunien a les taules de marbre del sindicat de la Construcció del carrer Montseny, 67, i parlaven de la llengua universal. Van fer amistat amb un grupet de la casa Henrich & C. (on treballava Massacs) que es reunien en una casa particular i junts van formar Paco kaj Amo⁸. Al cap d'un any, a l'octubre de 1907 feien la seva assemblea general i es va decidir d'acceptar com a membres sense pagament els cecs que volien aprendre esperanto. El 1909 gràcies a aquest i d'altres grups proletaris esperantistes, es celebraria el gran congrés a Barcelona i els del Paco publicarien un efímer butlletí que només arribaria al segon número.

Massacs des de molt petitet va viure les grans vagues generals de 1901 i 1902, motiu pel qual ja fou acomiadat per primera vegada. Tot això va influir en la seva consciència social. Els seus amics afirmaven que es va vincular amb els corrents del lliurepensament i el racionalisme escolar proper a Ferrer i Guàrdia i la seva Escola Moderna. Va treballar en diferents impremtes de Barcelona i el seu Pla, també a Can Batlló, el dipòsit de tramvies de Gràcia, i diversos llocs

8 *Bulteno de Esperanta Societo Paco kaj Amo* (Barcelona) n. 148, octubre, 1932.

mes. Es dona la dada que fou acomiadat el 1919 en relacionar-lo amb la vaga de la Canadenca per la jornada de vuit hores.

El seu nom aviat va sovintejar a la premsa i un fet li va donar notorietat: l'atemptat quasi *artesanal* contra el dictador Primo de Rivera. Massacs va tenir mala sort i l'atemptat fou frustrat i decidí la vida del nostre protagonista: amb un punyal a la mà pretenia acostar-se al cotxe presidencial, pujar-hi i assassinar el dictador Primo. Però va relliscar amb el marxapeu del cotxe i el punyal va sortir disparat i va quedar enganxat al sostre del cotxe, sense fer cap destrossa. Un dels policies de l'escolta va clavar a Massacs un cop de bastó al cap i el vindicador va caure inconscient i sota les rodes d'un dels cotxes que seguien el colpista. Aviat la premsa es va fer ressò de l'atemptat que va fer veure a Primo que no era ben rebut pels militants de "La Rosa de Foc", la majoria anarcosindicalistes: "L'agressor es diu Domènec Masacs i Torrentes, de trenta-quatre anys, anarquista, natural de Barcelona"⁹.

9 *L'Esquella de la Torratxa*, Barcelona, Núm. 2459, 6 d'agost, 1926. "Atemptat frustrat contra Primo de Rivera". Informacions també a *ABC*. Madrid, 3 d'agost, 1926.



Segons el rotatiu madrileny *El Tiempo* es descriu el jove obrer com: “un home alt, prim, d’uns trenta anys, va travessar molt de pressa el Pla de Palau, empunyant ben alt una navalla punyal nova de trinca, i la va llançar amb força sobre el tauler lateral dret, on va quedar clavada, per un moment. El General Primo de Rivera va fer aturar el cotxe, va examinar l’arma uns instants, l’entregà a una agent de policia i va seguir el seu camí”...“minuts més tard va saber que l’agressor havia estat detingut, oferint d’entrada alguna resistència”.

El periòdic explicà que fou detingut per l’inspector Francisco Román y els agents (Fernàndez, Roca, Quintela i Morgades). Massacs presentava ferides al peroné i la tibia produïdes en ser atropellat pel cotxe que circulava darrera del dictador. Els madrilenys explicaven que tenia 35 anys, era jornaler i que en resistir-se va produir erosions als policies, i que va mossegar a un al turmell, i fracturà una cama a un altre. Massacs fou dut al dispensari i guarit d’urgència, fou hospitalitzat, detingut i incomunicat. Interrogat pel jutge militar Lima afirmà que va actuar completament sol. També l’interrogaren el general Quejido i el governador i aquests van confirmar que era anarquista i que vivia amb Juan Blanca, obrer, i que havia viscut amb Pere Mateu, implicat en l’execució de Dato. Es dona la dada que Massacs treballava com a greixador a la fàbrica de teixits de Vidal Hermanos i que a Barcelona vivia a dispesa al carrer del Conde (no sabem si el carrer del Raval).

A la premsa es donaven més dades: fou detingut (1918) per fer injúries contra el ministre d’Hisenda quan va visitar Barcelona, a la sortida del penal del Puerto de Santa Maria (1919)¹⁰, fou novament empresonat acusat d’atemptat contra la Guàrdia Civil i complicat en el complot contra Arlegu. A la sortida de la presó, fou saludat amb alegria pels seus companys esperantistes. En concret deien: “Per

fi, després de sis anys d’absència, es troba de nou entre nosaltres el company D. Massacs. Benvingut sia. Es prepara una festa en el seu honor. S’avisarà oportunament”¹¹. Ignorem si es va aconseguir celebrar la seva tornada a Gràcia, ja que Massacs, amablement, va declinar l’oferiment de celebrar la festa en el butlletí del mes de maig: era un home discret i senzill. Dos mesos després al juliol ja serà novament a la presó i no en sortirà fins el 1931.

Sabem que el 1926, sortint del penal va trobar feina a Sallent (Vidal Hermanos) i va començar a madurar la idea del magnicidi: acabar amb la vida del general Primo de Rivera que havia empresonat tants lluitadors socials i clausurat els sindicats i la premsa anarquista. Aprofitant la visita a Barcelona del personatge va decidir de comprar un arma i fer l’atemptat. Un atemptat que fou quasi ignorat per la història i que es va pretendre que passés desapercebut pel mateix règim dictatorial. Es volia maquillar la imatge de la Barcelona rebel i revolucionària, associada a les bandes patronals i el pistolerisme. La premsa va dir que es tractava d’un sonat o un exaltat, i es va minimitzar el fet, no fos que d’altres s’engresquesin a l’acció als carrers. Potser es per això que no trobem dades del judici en la premsa d’aquells anys, diuen que per ordre del mateix Primo. L’individualista Massacs fou condemnat a 10 anys de presó i el 19 de gener de 1927 arribava al penal de Cartagena.

Una mostra de la popularitat i l’estima cap en Massacs és el retrat que es publica a la portada de *La Rambla: setmanari d’esports i d’actualitats* i que és obra de Helios Gómez, el popular artista anarquista i comunista¹². El motiu es la petició d’amnistia per als presos de la dictadura de Primo de Rivera. Hi va haver uns primers alliberats de les presons, però l’indult, no va arribar als presos obrers entre els quals es trobaven Massacs,

Joan Baptista Ascher, *Shum*, Lluís Nicolau, Pere Mateu, Gulot, Sancho Alegre i d’altres.

El 17 d’abril de 1931 arribà l’amnistia i Massacs es posà a treballar a l’Espanya Industrial de Sants. El butlletí del Paco anuncià la seva llibertat el mes de maig i a l’octubre estava fent classes d’esperanto¹³. Afirmaven que des que sortí de la presó treballava amb un minso jornal i que en acabar anava a la Biblioteca Popular de la Diputació, on s’estava dues hores cada dia. En Fernàndez Jurado explicà que Massacs es va negar que el declaressin boig en fer l’atemptat i per això el van condemnar a 30 anys. Explica també que a la presó coincidí amb Joaquim Maurin i David Rei¹⁴: “Els dos explicaren que quan Massacs entrà a la Model li deien “Guzmán el Bueno” pel fet que el ganivet caigué a terra [...] en Massacs era dolç i pacient i mai s’enfadà per les bromes dels seus companys de captiveri¹⁵”.

El 1939 fou novament detingut a causa del seu passat compromès i restà a la presó fins 1942. Es va reincorporar a la seva feina del tèxtil fins el 1957, en què es va jubilar i ho va celebrar amb una bella poesia que va regalar als seus amics, on explicava que com a laic i obrer aquesta fou una de les poques celebracions de la seva vida proletària¹⁶. Continuà ensenyant Esperanto al Club d’Amics de la UNESCO a bona part dels resistents i militants dels anys més foscos. Va morir a Gràcia, entre llibres, papers i retalls de premsa on pretenia elaborar un gran anuari enciclopèdic de celebracions obreres que es va perdre. El mateix va passar amb la seva gran biblioteca, ja que no fou acollida per ningú¹⁷. ■

13 *Bulteno de Esperanta Societo Paco kaj Amo*. Barcelona, octubre, 1931.

14 Es refereix a Daniel Rebull.

15 Ramon Fernàndez Jurado (1987: 40 i ss.)

16 Una còpia a l’arxiu de l’autora.

17 Entrevista amb Frederic Alberic, Barcelona, estiu 1989.

10 Havia passat anteriorment pel Dueso, segons diverses fonts.

11 *Bulteno de Esperanta Societo Paco kaj Amo*, Barcelona, abril, 1926.

12 *La Rambla*. Núm.: 3, 21 d’abril, 1930.

ACCIÓN SINDICAL OBRERA (1918-1932)

Xavier Alcalde
Polítòleg

A més de promoure un nacionalisme espanyol centralista, la dictadura de Primo de Rivera va intentar limitar l'activitat dels diferents moviments socials i polítics. Entre ells, destaquen els llibertaris, que van veure com de la nit al dia la majoria de les seves capçaleres, incloent-hi Solidaridad Obrera, eren prohibides. Tanmateix, va haver-hi algunes excepcions, com per exemple Acció Social Obrera (ASO), un setmanari bilingüe (tot i que la majoria dels textos són en castellà) publicat a Palafrugell i a Sant Feliu de Guíxols, que va arribar a tenir molta repercussió. ASO va dedicar a la llengua internacional un volum rellevant d'articles i notícies, enfortint així la relació entre l'anarquisme i el moviment esperantista català. A més, la seva lectura permet anar resseguint les principals vicissituds de l'esperantisme obrer en aquests anys.

Ja el 23 de març de 1919 hi trobem un article sobre la Comuna de París, aparegut originalment a *Internacia Socia Revuo*, la revista esperantista pionera sobre temes socials fundada per Paul Berthelot. El traductor, que signa com a Juny, és en realitat Víctor Lluís, que aviat es convertirà


(durant uns quants números) en el director d'ASO. En aquells moments, el setmanari es definia com a "Periòdic de cultura, educació social i defensor de les causes obreres". Posteriorment canviarà el seu subtítol a "Òrgan dels sindicats obrers", més endavant serà l'"Òrgan dels sindicats adherits a la Confederació Nacional del Treball" i finalment serà l'"Òrgan de les societats de la província de Girona adherides a la CNT".

I és que la CNT és un actor fonamental en aquesta història. El 3 de gener de 1920, ASO publica els principals acords adoptats al segon congrés de la CNT, que acaba de tenir lloc a Madrid. Hi podem llegir el següent: "Ha de tenir el proletariat un idioma auxiliar internacional. Es considera indispensable que l'Esperanto sigui l'idioma internacional en les nostres relacions i en els congressos internacionals. A tal efecte, en totes les escoles socialistes que funcionen actualment, així com a totes les que s'implantin, s'hi estableixi una classe d'esperanto. Recolzar moralment a tots els grups esperantistes que persegueixen la nostra finalitat, i interessar a últim els treballadors la

conveniència d'aprendre ràpidament l'Esperanto".

Com a resposta, el 21 de febrer de 1920, José Vigo, des de França, signa un article a doble pàgina en favor de la llengua internacional. "Els sindicalistes esperantistes, esperàvem aquesta decisió des de fa molt de temps i que no dubtem serà fructífera en el camp de la instrucció popular. (...) Abans de la guerra a Palamós formàvem un grup de 60 esperantistes." Vigo recorda com l'esperanto pot ser un instrument molt útil per a la lluita de classes i també aprofita per criticar l'Ido, mostrant que el debat entre els partidaris de les diferents llengües auxiliars és ben viu.

D'altra banda, ASO informa de l'acció local dels esperantistes. Així, el 18 de setembre de 1921 té lloc al centre obrer de cultura Floreal, a Salt, un acte públic "Pro-Esperanto" amb la participació de Joan Gili (president de KEF), Jaume Grau (redactor de *Kataluna Esperantisto*) i Delfí Dalmau. Signa diversos articles sobre el tema Stakanowitx, en els que explica que els ponents van destacar



ACCIÓN SINDICAL OBRERA (1918-1932)

Xavier Alcalde
Politologo

La dikturo de Primo de Rivera antaŭenigis centralizisman hispanan naciismon, kaj ankaŭ provis limigi la agadon de diversaj sociaj kaj politikaj movadoj. Inter ili elstaras la liberecanoj, kiuj vidis kiel subite multaj iliaj periodaj eldonaĵoj, inkluzive de *Solidaridad Obrera* [Laborista Solidareco], estis malpermesitaj. Tamen, kelkaj esceptoj ekzistis, kiel ekzemple Acción Social Obrera (ASO) [Laborista Socia Agado], du-lingva (hispane kaj katalune) semajngazeto (kvankam la plimulto el la tekstoj estis en la hispana) publikigita en Palafrugell kaj Sant Feliu de Guíxols, kiu iĝis tre influa. ASO dediĉis grandan kvanton da artikoloj kaj novaĵoj al la internacia lingvo, tiel plifortigante la rilaton inter anarkismo kaj la kataluna Esperantomovado. Ĝia legado ebligas krome spuri la evoluon de la laborista esperantismo en ĉi tiuj jaroj.


Jam la 23an de marto 1919 ni trovas en ASO artikolon pri la Pariza Komunumo, origine aperintan en *Internacia Socia Revuo*, la pionira esperantista revuo pri sociaj aferoj fondita de Paul Berthelot. La tradukinto, subskribinte kiel Juny, estas Víctor

Lluís, kiu baldaŭ fariĝis (por kelkaj numeroj) direktoro de ASO. Tiutempe, la gazeto estis difinita kiel “Revuo pri kulturo, socia edukado kaj defendanto de laboristoj”. Ĝi poste ŝanĝis sian subtitolon al “Organo de la sindikatoj”, poste ĝi fariĝis la “Organo de la sindikatoj aliĝintaj al Confederación Nacional del Treball (CNT) [Nacia Konfederacio de la Laboro]” kaj fine la “Organo de la societoj de la provinco de Ĝirono aliĝintaj al CNT”.

Fakte, CNT rolis grave en ĉi tiu rakonto. La 3an de januaro 1920, ASO publikigis la ĉefajn interkonsentojn adoptitajn en la dua kongreso de CNT, ĵus okazinta en Madrido. Ni povas legi la jenon: “La proletaro devas havi internacian helplingvon. Oni konsideras nepra, ke Esperanto estu la internacia lingvo en niaj rilatoj kaj en internaciaj kongresoj. Tiucele estu starigita Esperanto-klaso en ĉiuj socialismaj lernejoj, kiuj nuntempe funkcias, same kiel en ĉiuj, kiuj efektiviĝos. Doni moralan subtenon al ĉiuj Esperanto-grupoj, kiuj celas nian celon, kaj finfine interesigi la laboristojn pri la taŭgeco rapide lerni Esperanton”.

Reage, la 21an de februaro 1920, José Vigo, el Francio, subskribis dupaĝan artikolon favore al la internacia lingvo. “Ni, la Esperantistaj sindikatanoj, delonge atendis tiun ĉi decidon kaj ni ne dubas, ke ĝi estos fruktodona sur la kampo de la popola edukado. (...) Antaŭ la milito en Palamós ni formis grupon de 60 esperantistoj”. Vigo memorigis, kiel Esperanto povas esti tre utila instrumento por la klasbatalo kaj ankaŭ profitis la okazon por kritiki Idon, tiel montrante, ke la debato inter la subtenantoj de la diversaj helplingvoj viglis.

Aliflanke, ASO informis pri la loka agado de la esperantistoj. La 18an de septembro 1921, en la laborista kulturcentro Floreal en Salt okazis publika konferenco “Por-Esperanto” kun partopreno de Joan Gili (prezidanto de KEF), Jaume Grau (redaktoro de *Kataluna Esperantisto*) kaj la konata fakulo pri lingvoinstruado Delfi Dalmau. Plurajn artikolojn pri subskribis Stakanowitzch. Danke al ili, ni scias ke la prelegantoj emfazis, ke “la laboristoj devas okupi avangardan pozicion en la batalo por Esperanto”. La konferenco enkadriĝis en la kreo de Regeneración, nova esperantista grupo en Salt, en kiu la



que “els obrers hem d’ocupar un lloc d’avantguarda en la lluita en favor de l’esperanto”. L’acte s’emmarca en la creació d’un nou grup esperantista a Salt, Regeneración, on dona classes de la llengua el jove professor Conrad Domènech. Stakanowicz considera que gràcies a l’esperanto el centre obrer de cultura Floreal es pot apuntar “un nou triomf moral” i que d’aquesta manera els obrers “contribuirem directament a la nostra regeneració, allunyant-nos del joc i de l’alcoholisme que tants disgustos i perjudicis costa”. De manera similar, ASO informa dels cursos que ofereix el grup esperantista Universo, de Vilassar de Dalt, o els que es fan al local de la Federació Obrera de Sant Feliu de Guíxols.

Un punt d’inflexió és la creació de la SAT a Praga el 1921, presentada com la primera associació mundial esperantista de lluita de classes. ASO dedica una sèrie d’articles a aquesta associació i als seus congressos. I comencen a aparèixer textos sobre l’esperanto (o sobre altres temes) signats per “Un S.A.T.-ano.”, “Un S.A.T.-ano de Barcelona”, “Un S.A.T.-ano de Girona”, “S. A. T.-ano Batkori”, “S. A. T.-ano Muñoz”, “S. A. T.-ano J. Borrell”, “S. A. T.-ano 357” o “S. A. T.-ano 2495”. Un dels principals satanoj locals és el futur professor Josep Xena Torrent, que signa com “Xena, membre del grup d’esperanto de Palafrugell”. Per la seva banda, el futur metge José Borrell sembla l’enllaç més actiu entre el grup de Barcelona i els esperantistes gironins, que de vegades fan servir les pàgines d’ASO per comunicar-se. Així, el 16 de desembre de 1922 i sota un article que signa “Un S. A. T. ano. de Girona” hi apareix la següent nota de “Kdo. Borrell. — Dankon. Ni povas rekontighi en la Enciklopedio Ateneo la tago[n] 23 je la oka nokte. Chu vi volas traduki tiun chi artikolo[n] kaj sendi ghin al «S. R.»?” No debades, l’Ateneu Enciclopèdic Popular és un dels nuclis clau de l’esperantisme barceloní.

A principis de 1924 comença a publicar-se per lliçons la traducció del

Course rationnel et complet d’esperanto — abans se n’havia publicat ja el prefaci, obra de l’escriptor Henri Barbusse. El responsable n’és el Barcelona Grupo de SAT-anoj, que es mostra molt actiu en aquesta tasca de traducció. Els seus membres publiquen regularment a ASO diferents articles sobre temes internacionals traduïts de revistes com Sennaciulo o Sennacieca Revuo. La seu d’aquest grup és al Sindicat de Metallúrgia, al carrer Mercaders 26, molt a prop del mercat de Santa Caterina. Per tal de treure el màxim profit del curs, s’aconsella practicar i estudiar en grup, i s’ofereix l’opció de fer venir un esperantista estranger, mitjançant la SAT. La setanta-cinquena i darrera lliçó es publica el 29 d’agost de 1925. Mesos abans el mateix grup havia publicat, també per parts, el manifest de Lanti For la neŭtralismo!

Mentrestant, les escissions, que sovintegen en les organitzacions del moviment obrer, no són alienes a l’esperantisme proletari. Així, l’agost del 1925 la Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES) comença a publicar a Berlín el seu òrgan mensual Libera Laboristo i evidentment ASO se’n fa ressò. Com a conseqüència, molts llibertaris que sentien que la SAT estava massa esbiaixada cap als postulats comunistes, es passaran a la TLES. En aquest context, apareixerà a les pàgines d’ASO el grup de TLES-anoj de Barcelona, molt connectat al setmanari guixolenc. De fet, fa la sensació que la redacció d’ASO és capaç de rebre correspondència en esperanto. D’altra banda, informacions sobre TLES apareixen regularment com a part de les activitats que hi publica l’Associació Internacional de Treballadors (AIT) en els seus informes.

Mostrant el seu caràcter obert, ASO publica de manera excepcional algun article contrari a l’esperanto, com per exemple “La lengua Internacional”, que signa Diógenes des de la presó de Barcelona. Hi defensa la major utilitat per als obrers d’estudiar llengües com l’anglès, el francès o l’alemany. És indicatiu que els redactors se senten

obligats a afegir-hi la següent nota: “N. de R.—Encara que completament disconformes amb el present article, el publiquem”. En el context d’ASO, aquest tipus d’articles són anecdòtics i hi ha una presència molt aclaparadora de textos que lloen la llengua internacional i exhorten els obrers a aprendre-la i practicar-la.

Menys anecdòtica és l’activitat dels defensors de l’ido a les pàgines d’ASO. Sense arribar als debats encesos entre els partidaris d’una llengua i l’altra que tindran lloc en altres publicacions llibertàries d’aquesta època, com La Revista Blanca, a ASO hi presenten els seus cursos, les seves publicacions i les seves associacions. I és que la Societat Idista Espanyola té la seu al carrer Premià 35, al barri barceloní de Sants. Destaquen que aquest “esperanto reformat” és un idioma eufònic, però no només. El 25 d’abril de 1931, tot just inaugurada la Segona República espanyola, es publica l’article “Aprended Ido”, signat per Francisco Ferrer. Entre les seves virtuts, hi podem llegir que és una llengua “oberta a tota reforma” i més fàcil d’aprendre que l’esperanto. A més “l’Ido és l’idioma internacional dels revolucionaris. Són múltiples les revistes en Ido eminentment subversives”. Amb aquesta propaganda, és probable que els lectors d’ASO tinguessin una mica de confusió respecte al tema de la llengua auxiliar internacional. I és que l’ido assolirà en aquests anys i en els anys posteriors un nivell de difusió entre els llibertaris catalans poc freqüent, donat que pràcticament arreu l’esperanto ja havia guanyat la batalla lingüística entre les diferents opcions de llengües construïdes.

En definitiva, els dos centenars llargs d’articles consultats mostren la resistència i la vitalitat de les organitzacions esperantistes d’arrel obrera en un moment políticament complicat. ■

La Biblioteca de Catalunya té digitalitzats tots els números disponibles del setmanari Acción Social Obrera: <https://xacpremsa.cultura.gencat.cat>.



Dank' al Esperanto la laborista kulturcentro Floreal atingis “novan moralan triumfon”

juna instruisto Conrad Domènech instruis la lingvon. Laŭ Stakanowicz, dank' al Esperanto la laborista kulturcentro Floreal atingis “novan moralan triumfon”; tiu maniere la laboristoj “kontribuos rekte al nia regenerado, forigante nin de la mon-ludado kaj alkoholismo, kiuj tiom da ĝenoj kaj damaĝoj kostas”. Simile ASO informis pri la kursoj proponataj de la Esperanto-grupo Universo, en Vilassar de Dalt, kaj pri tiuj okazantaj en la Laborista Federacio en Sant Feliu de Guíxols.

Turnopunkto estis la fondo de SAT en Prago en 1921, prezentita kiel la unua monda Esperanto-asocio por klasbatalo. ASO dediĉis serion de artikoloj al tiu ĉi asocio kaj ĝiaj kongresoj. Kaj tekstoj pri Esperanto (aŭ pri aliaj temoj) komencis aperi subskribitaj de “S.A.T.-ano”, “S.A.T.-ano el Barcelono”, “S.A.T.-ano el Ĝirono”, “S. A. T.-ano Batkori”, “S. A. T.-ano Muñoz”, “S. A. T.-ano J. Borrell”, “S. A. T.-ano 357” aŭ “S. A. T.-ano 2495”. Unu el la ĉefaj lokaj satanoj estis la estonta instruisto Josep Xena Torrent, kiu subskribis kiel “Xena, membro de la Esperanto-grupo de Palafrugell”. Siaflanke, la estonta kuracisto José Borrell ŝajnis esti la plej aktiva ligilo inter la barcelona grupo kaj la ĝironaj esperantistoj, kiuj foje uzis la ASO-paĝojn por interkomunikiĝi. Tiel, la 16an de decembro 1922 kaj sub artikolo subskribita de “S.A.T.-ano de Ĝirono” aldoniĝis la jena noto de “Kdo. Borrell. Dankon, ni povas rekontiĝi en la Enciklopedia Ateneo la tago[n] 23 je la oka nokte. Chu vi volas traduki tiun ĉi artikolo[n] kaj sendi ĝin al «S. R.»?”. Popola Enciklopedia Ateneo ja estis unu el la ĉefaj

centroj por esperantistoj en Barcelono.

Komence de 1924 ekeldoniĝis per lecionoj la traduko de *Cours rationnel et complet d'esperanto* [Racia kaj plena Esperanto-kurso] — antaŭ tio jam estis eldonita ĝia antaŭparolo de la verkisto Henri Barbusse. Respondeis pri la Barcelona Grupo de SAT-anoj, kiu tre aktivis en tiaj tradukaj taskoj. Ĝiaj membroj regule publikigis en ASO artikolojn pri internaciaj temoj tradukitaj el revuoj kiel *Sennaciulo* aŭ *Sennacieca Revuo*. La sidejo de tiu grupo estis ĉe la Metalurgia Sindikato, strato Mercaders 26, proksime de la bazaro de Santa Caterina. Por plej profiti la kurson, oni rekomendis ekzerci kaj studi grupe, kaj ekzistis la eblo venigi eksterlandan esperantiston, pere de SAT. La sepdek-kvina kaj lasta leciono estis publikigita la 29an de aŭgusto 1925. Monatojn antaŭe, la sama grupo publikigis, ankaŭ en partoj, la manifeston de Lanti *For la neŭtralismom!*

Dume, disiĝoj, kiuj ofte okazas en la organizaĵoj de la laborista movado, ne estis fremdaj al la proleta esperantismo. En aŭgusto 1925, la Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES) komencis eldoni sian monatan organon *Libera Laboristo* en Berlino, kaj ASO evidente parolis pri ĝi. Rezulte, multaj liberecanoj kiuj sentis ke SAT estis tro favora al komunistaj ideoj, transiris al TLES. En ĉi tiu kunteksto, videblis sur la paĝoj de ASO la grupo de TLES-anoj el Barcelono, tre ligita al la gazeto eldonita en Sant Feliu de Guíxols. Fakte ŝajnas, ke la redakcio de ASO kapablis ricevi korespondadon en Esperanto. Aliflanke, informoj pri TLES aperis regule kadre de la agado publikigita en la raportoj pri la Internacia Laborista Asocio (AIT).

Montrante sian malferman naturon, ASO escepte publikigis artikolojn kontraŭ Esperanto, kiel “La lengua Internacional” [La Internacia Lingvo], subskribita de Diógenes el barcelona malliberejo la 12an de januaro 1924. Diógenes defendis, ke la stud-

ado de lingvoj kiel la angla, franca aŭ germana estis pli utilaj por la laboristoj. Notindas, ke la redaktoroj sentis sin devigitaj aldoni la jenan noton: “Eĉ se ni tute malkonsentas kun ĉi tiu artikolo, ni publikigas ĝin”. En la kadro de ASO, ĉi tiaj artikoloj estis anekdotaj, kaj multnombri la tekstoj laŭdantaj la internacian lingvon kaj admonantaj la laboristojn lerni kaj praktiki ĝin.

Malpli anekdota estis la agado de la Ido-defendantoj sur la paĝoj de ASO. Sen eniri la ardaĵajn debatojn inter la subtenantoj de unu lingvo kaj la alia, kiuj okazis en aliaj anarkiismaj eldonaĵoj de ĉi tiu epoko, kiel *La Revista Blanca* [La Blanka Revuo], en ASO idistoj prezentis siajn kursojn, publikigaĵojn kaj asociojn — Fondita en 1927, la Hispana Ido Societo havis sian sidejon ĉe strato Premià 35, en la barcelona kvartalo Sants. Ili emfazis, ke tiu ĉi “reformita Esperanto” estis eŭfonia lingvo, sed ne nur. La 25an de aprilo 1931, tuj post la proklamoinaŭguro de la Dua Hispana Respubliko, legeblis la artikolo “Aprended Ido” [Lernu Idon], subskribita de Francisco Ferrer. Oni povis legi, ke Ido, inter aliaj virtoj, estas lingvo “malfermita al ĉia reformo” kaj pli facile lernebla ol Esperanto. Krome, “Ido estas la internacia lingvo de la revoluciuloj. Estas multaj elstaraj subfosaj revuoj en Ido”. Fronte al ĉi tiu propagando, verŝajne la legantoj de ASO konfuziĝis pri la temo internacia helplingvo. Iel ajn, Ido atingis maloftan disvastiĝon inter la katalunaj liberecanoj en ĉi tiuj kaj en la sekvaj jaroj, konsiderante ke preskaŭ ĉie Esperanto jam gajnis la lingvan batalon inter la diversaj planitaj lingvoj.

Resume, la pli ol ducent artikoloj konsultitaj montras la reziston kaj viklecon de tiuj Esperanto-organizaĵoj kun laboristaj radikoj en politike malfacila momento. ■

La Biblioteko de Katalunio ciferecigis ĉiujn disponeblajn numerojn de la semajnjurnalo *Acción Social Obrera*: <https://xacpremsa.cultura.gencat.cat>.

ALGUNS ESPERANTISTES DESTACATS DURANT LA DICTADURA DE PRIMO DE RIVERA

Xavier Margais Basi
Historiador

El cop d'estat i la proclamació d'una dictadura militar varen constituir un fort trasbals per al moviment esperantista dels Països Catalans. La resposta que donaren aquells homes i dones a la dictadura fou formidable. Amb la seva actuació varen mostrar que eren unes persones digníssimes. Enumerem alguns dels esperantistes que se significaren durant aquell temps.

Sebastià Alberich Jofré. Comerciant. Barceloní. Fou secretari dels Jocs Florals Internacionals. Signant com a *Sojlo* va escriure moltes traduccions i recensions per al *Kataluna Esperantisto*.

Joan Barceló Andreu. Treballà activament en el Club de Palma i fundà seccions esperantistes en associacions mallorquines. Col·laborà en la Enciclopèdia d'Esperanto.

Narcís Bofill Miró-Granada. Enginyer mallorquí. Va col·laborar en diverses publicacions esperantistes. Fou membre de l'Acadèmia de la Llengua.

Palmira Castellví, barcelonina. Morí a Caracas. Activa esperantista, d'adolescent participà en el V Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona l'any 1909. Era membre de la «La Metiisto». Cantant.

Sebastià Chaler Arnau. Fou professor d'Esperanto a Terrassa. Natural de Vinaròs, va promoure el congrés de KEF en aquesta ciutat de la Plana, l'any 1928.

Delfi Dalmau Gener. Nascut a Figueres. Fundador del Liceu Dalmau. Autor de nombrosos assajos sobre llengua en català i en Esperanto. Esperantista des de l'any 1909. Col·laborador en diverses publicacions esperantistes i catalanes. Va presidir KEF durant la dictadura i fou represaliat.

Bartomeu Font Cantallops. Prevere. Celebrà misses en esperanto. Va fundar el club esperantista de Palma i va establir el barri de Son Ferriol d'aquesta ciutat on anomenà el carrer Zamenhof i el carrer Esperanto.

Joan Gili Norta. Comerciant, nascut a Barcelona. Fou president de KEF. Autor d'obres de teatre en esperanto.

Jaume Grau Casas. Barceloní. Fou durant anys redactor de *Kataluna Esperantisto*. Col·laborà en diverses revistes i fou autor d'obra poètica en català i en esperanto. Referent de *Kataluna Antologio*.

Marià Jaquotot Molina. Industrial. Pioner de l'esperantisme a Mallorca. Membre de l'entitat esperantista mallorquina va superar les dues dictadures militars. Va arribar a quasi centenari i no va abandonar mai l'esperantisme.

Marian Solà Montserrat. Fou un dels pioners de l'esperantisme català. S'hi adherí el 1909. Fou membre de l'Acadèmia de la Llengua.

Per a totes aquestes persones i moltes més que mantingueren el moviment esperantista durant la dictadura del general Miguel Primo de Rivera, expressem el nostre reconeixement per la seva coherència i dignitat. ■

SALUTON

Carles Costa i Muntadas

President del LKK
(Loka Kongresa Komitato)

El lector no avesat a una determinada llengua auxiliar pot creure que el títol és erroni. Efectivament, ho seria, si no fos perquè no és en català, sinó en esperanto. El llegidor també podria pensar en el motiu pel qual avui, un vigatà, parla d'esperanto. Molt senzill, per recordar la història, més concretament, la de fa un centenar d'anys.

Per contextualitzar-la, parlem primerament de l'eminent científic vigatà Josep Pratdesaba i Portabella. És conegut popularment com a astrònom, però prefereixo referir-m'hi com a científic a fi de no ometre altres disciplines amb les que també va excel·lir. Podem dir, sense por d'errar, que va democratitzar la ciència: almenys a Vic. A banda, també fou un home inquiet i interessat en la cultura i especialment en les llengües. En aquest context, el vint-i-set d'abril de 1907, el vigatà llançava la idea de l'esperanto a la societat vigatana a través de la *Gazeta Montanyesa*:

Temps há se remou per Europa l'idea de crear un idioma internacional, idioma que sens donar la preponderancia a tal o qual nació sigui assequible a tothom y se componga de partícules o arrels de totes les que formen les dos

*El 40è Congrés
Català d'Esperanto se
celebrarà a Vic i aprofitarà
l'avinentesa, també, per
recuperar la memòria i el llegat
de Josep Pratdesaba, cofundador
del Vika Esperantistaro i de
l'Ateneu Balmes, i gran
divulgador de la ciència i
de l'esperanto.*

XAVIER FEBRER CLAVENS



més importants rames llatina y germánica. Aqueix pensament que'l Dr. Lamenhos [Zamenhof] vol portar a la práctica compta ja per Europa y América varis y entusiastes adeptes; verdaderament resultaria prácticich que totes les nacions civilisades adoptessin una parla internacional, que sens rebaixar la súa propia, servís per les comunicacions entre diferents nacions tant per assumptes comercials com per congressos científichs, pedagógichs, etc., etc.

Com molt bé descriu Pratdesaba, l'esperanto pretenia ser la llengua universal d'aleshores. La definitiva consolidació d'aquesta llengua auxiliar va arribar el 1905, amb el Primer Congrés Universal d'Esperanto a Boulogne-sur-Mer. I conclouia aquell article afirmant:

Sembla que a Vich hi há verdader entusiasme per l'idea de fundar una agrupació Esperantista, cosa que seria de molt bon veure y que segurament li prestaran el seu apoyo tots els amants del progrés en qualsevol ram que aqueix se manifesti y mes al cultiu intel·lectual que sembla ha sigut sempre patrimoni de la noble ciutat den Balmes.

Pratdesaba no anava mancat de raó. L'entitat Vika Esperantistaro va néixer oficialment en el si de l'entitat Catalunya Vella uns mesos després d'aquest auguri. L'acte inaugural es va dur a terme el vint-i-cinc de gener de 1908. D'acord amb la crònica local, «l'èxit del acte superará bona cosa a les seves esperances». No obstant aquest relat, el germen de l'entitat va néixer un temps abans. Ho podem afirmar gràcies a l'article de Josep Albagés a la revista *Kometo*, a la qual de seguida tornarem a fer referència. En les seves paraules, el cofundador, expresident i exprofessor del Vika Esperantistaro, explica els orígens de l'associació:

Dum la aŭtuno de la jaro 1906^a, ĉe la kuracisto D-ro. Terricabras, kunvenis, plue tiu lerta pioniro de

nia Kataluna esperanta movado. S-roj. Sales Balmes, Pratdesaba, Delclos, Navés, kay la subskribanto. Ni decidis malfermi Esperantan kurson, kion ni faris ĉe la lernejo Sankta Mikaelo de tiu ĉi urbo. Baldaŭ ni atingis la sumonda 40 lernantoj inter la plej valoraj kulturamantoj el Vich. Post kelkaj semajnoj, kiam ni jam sciis iom Esperanton, ni fondis la societon kiu estas nomata Vika Esperantistaro, sub la prezidanteco de D-ro. Terricabras. Poste ni transloĝis al la societo Catalunya Vella, kie ni daŭrigis kursojn, paroladojn kaj festojn.

Un any més tard, el mateix periòdic avaluava la vida del Vika Esperantistaro amb motiu de la festa del seu primer aniversari. Entre altres coses, es va fer una exposició de postals i el fet d'haver-n'hi més de dues-centes de quasi totes les nacions del món, així ho diu *La Gazeta Montanyesa*, palesa la bona anomenada que tenia el Vika Esperantistaro al llarg i ample del globus terraquíu.

El 1910, any del centenari del naixement del també vigatà Jaume Balmes i Urpià, va sorgir la idea de crear un ateneu en honor a l'il·lustre filòsof. Aquest nou ateneu cultural va néixer, al seu torn, de les files del Vika Esperantistaro. *La Gazeta Montanyesa* en donava notícia als seus lectors: «Avençan ab èxit els treballs per la creació del Ateneu Balmes». Preveïen que durant aquell mateix mes d'octubre, es podrien convocar els ateneïstes a fi d'aprovar els estatuts i la constitució de la nova entitat. Finalment, l'assemblea es va celebrar el tretze de novembre a les sis de la tarda. Tristament, l'Ateneu Balmes va tenir una curta durada: conten que prop d'un any.

No obstant això, la vida del Vika Esperantistaro va seguir amb èxit. Van arribar a canviar de local un mínim de tres vegades. En l'entretant, els *samideanoj* oferien cursos d'esperanto a qui volgués aprendre'l. A més, a jutjar per les cròniques d'alguns

mitjans, Vic disposava d'excel·lents professors: en el concurs de la Societat Barcelonesa d'Amics de la Instrucció que feia d'estudis pedagògics, foren premiats els senyors Albagés, Delclos i Naves, tots ells mestres de la Ciutat dels Sants i cofundadors de l'entitat esperantista vigatana. El cert és que bona part de la societat vigatana d'aquells primers anys de segle va donar suport a la iniciativa des de bon principi: és clar, bona part dels fundadors eren coneguts i reconeguts: Jaume Sales Balmes; Josep Maria Terricabras, metge de renom, i primer president de la KEF (Kataluna Esperanto Federacio) [‘Federació Esperantista Catalana’]; J. Delclos; Josep Albagés; Josep Pratdesaba; Jacint Comella, futur alcalde de la ciutat; etc. Tota aquesta bona acollida va quedar encara més de manifest entre els anys 1920 i 1923 quan diversos *samideanoj* osonencs van acollir una quinzena de nens austríacs que fugien de les conseqüències de la Primera Guerra Mundial (1914-1918). D'aquesta quinzena, deu van ser acollits per vigatans, mentre que quatre per manlleuencs.

El punt més àlgid del Vika Esperantistaro, però, va arribar l'any 1924. Els dies vuit, nou i deu de juny d'aquell any es va celebrar a la ciutat de Vic el XI^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio [‘Onzè Congrés de la Federació Esperantista Catalana’]. És a dir, l'any que ve es commemorarà el centenari. Just el dia abans, qui s'encarregava de donar la benvinguda als esperantistes no era cap altre que l'eminent canonge Jaume Collell. Ho feia a la portada de la seva *Gazeta de Vich*. Curiosament, sembla que aquell 1924 l'opinió de Collell sobre l'esperanto havia canviat lleugerament: havia passat d'afirmar en la presentació d'un llibre d'Antònia Bardolet l'any 1913 que «[...] aprendre'l francés, l'inglés y sostenir una correspondència tirada ab esperantistes de llunyes terres, feyna per mi un poc sobrer», a «[...] verdaderament un idioma auxiliar que pot prestar y presta bons serveys, y encara está destinat a presertarne de majors [...]».

Pel que fa als dies del Congrés, com no podia ser d'altra manera, la societat i les entitats s'hi van bolcar. Als aparadors de les botigues s'hi van exposar diverses coses esperantistes. Es va erigir un monument a la pau, just davant de la casa Comella: avui dia encara se'n pot veure alguna fotografia amb els fanals gaudinians de fons. Es van rebre els congressistes a la Sala de la Columna de l'Ajuntament on se'ls va donar la insígnia i el llibre del Congrés. La insígnia, per primera vegada fou de bronze. Quant a les congressistes, val la pena mencionar que n'hi havia moltes més que en els anteriors congressos. Es va inaugurar una exposició al Temple Romà on s'hi podien veure llibres, catàlegs, revistes, cartells, postals... tot de material en esperanto. També es feren

visites al Museu Arqueològic i a la catedral, com també se celebrà una missa a l'Escorial. Els congressistes també pogueren anar d'excursió, i fins i tot ballar sardanes. En l'àmbit més lúdic, se celebrà un concert-festival, i fins i tot uns Jocs Florals. En el terreny periodístic, aquells dies es publicà de manera extraordinària la revista *Kometo*, la revista del Congrés. Essent el Josep Pratdesaba el secretari del Comitè Organitzador, no és d'estranyar que s'intitulés així per allegoritzar la mateixa llengua auxiliar. En resum, foren tres dies plens d'activitats que valia molt la pena rememorar d'alguna manera.

És per tot això i més que l'any que ve el 40è Congrés Català d'Esperanto se celebrarà a Vic. Havent exposat tot el que hem exposat, el lema del Congrés és molt encertat: «Els ateneus populars i la democratització de la ciència». Naturalment, s'aprofitarà l'avinentsa, també, per recuperar la memòria i el llegat de Josep Pratdesaba, cofundador del Vika Esperantistaro i de l'Ateneu Balmes, i gran divulgador de la ciència i de l'esperanto. En la mesura que es pugui, també s'intentarà reproduir actes que se celebraren ara fa quasi cent anys. I poc més per avui, més enllà d'acomiar-me. Com que he encapçalat aquestes línies amb un *Saluton* per saludar a tots els *samideanoj*, permeteu-me acabar-lo amb un *ĝis la revido* ['A reveure']. ■

El 40è Congrés Català d'Esperanto se celebrarà del 17 al 20 de maig del 2024 a Vic i sota el lema "Ateneus populars i democratització científica", un tema que entronca directament amb la feina que va fer Pratdesaba i amb el moviment esperantista que va créixer en els ateneus populars.

El motiu principal pel qual s'ha triat la capital d'Osona és per la commemoració del **centenari del Congrés Català d'Esperanto** que va organitzar Josep Pratdesaba i Portabella a la ciutat de Vic el 1924.

Coneixement, astrologia, democratització científica, ateneus populars, moviment esperantista, cultura. Tot això és el que trobareu en el 40è Congrés Català d'Esperanto a Vic.

Reserveu-vos les dates i estigueu atents!

FORPASIS CARME JUNYENT I FIGUERAS

Nicolau Dols

Prezidanto de la Secció Filològica de Institut d'Estudis Catalans

La 3an de Septembro forpasis Carme Junyent i Figueras (naskiĝinta en 1955). Ne oftas popolaj konsternoj pro morto de lingvistoj aŭ de iu ajn alifakaj sciencistoj. Tamen ekde ŝia morto ne ĉesas la artikoloj, esprimoj de kondolencoj, reelsendado de intervjuoj radiaj kaj televidaj ktp. Do pro kio tiom da tremo en la kataluna socia medio? Unuavice necesas diri ke Carme Junyent estis klarega homo kaj aŭtorino de longa listo de firme fundamentitaj verkoj pri lingvistiko, ĉefe pri lingva diverseco, pri vivo, evoluo kaj malapero de lingvoj. Post kiam ŝi akiris licencion pri Latinida Filologio en Barcelono ŝi plivastigis siajn konojn pri lingvistiko en Germanio kaj Usono, kaj finfine denove en Barcelono ŝi doktoriĝis per tezo pri la bantua lingvoj. *Les llengües d'Àfrica* kaj *Les llengües del món* estas ĉefverkoj de ŝi kaj vaste konataj de generacioj de lingvistoj kaj de interesigantoj pri

lingvistiko. Tiun scivolon pri la rilato inter lingvoj kaj socioj ŝi aplikis al la analizo de nia propra socio kaj al la esploro de kiom da lingvoj kundividas la teritorion kun la kataluna. Post ŝia esploro de lingvodiverseco en diversaj lokoj de la mondo ŝi pruve konkludis ke lingva diverseco pli konvenas al la daŭripovo de lingvoj ol la simpla kunekzisto de nur du lingvoj en la sama teritorio: la tiel nomata dulingveco ĉiam estas procezo per kiu finfine unu el la du lingvoj malbligas la pluekziston de la alia. Tiom interesa por lingvistoj kaj ĝenerale por nia socio estas ĉi tiuj kontribuajoj al ŝia sciencfako kiel la temo pri kiu ŝi lastatempe dediĉis grandan energion: la klarigado de la rilatoj inter gramatikaj ecoj kaj sociaj faktoj, kaj nome rilate al la genro. Ŝia voĉo laŭte kaj science audiĝis pri ĉi tiu temo. Pri tio ŝi kunordigis la libron *Som dones, som moltes, som lingüistes i diem prou* (2021). Gravas ŝia sindediĉo al la sci-

enco kaj ŝia granda laborkapablo, kaj gravas ankaŭ ŝia facileco komuniki al la socio ŝiajn malkovrojn. Jen kial tiom konsternis ŝia morto fakulojn kaj ne-fakulojn. Ni vere sopiros ŝin.

Pro sia esplorsperto pri lingvodiverseco ŝi estis invitita al la 39a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazinta en Castelldefels. Tie ŝi prelegis al ni la 3an de Junio 2022.

Morto alvenis al ŝi antaŭ ol la ĝenerala asembleo de Institut d'Estudis Catalans pravigis ŝian elekton kiel korespondan membron, jam aprobita de Secció Filològica.

Mi preferas ne pensi kiom ni perdis pro ŝia forpaso, sed kiom ni akiris per ŝia instruo.

Ripozu pace Carme Junyent i Figueras. ■

FORPASIS MARIA FERIGLE DANTI

Rosa López

Membro de KEA kaj kunorganizinto de la du lastaj Internaciaj Esperanto-Semajnoj de la Kulturo kaj Turismo

Maria, nia kara samideanino, forpasis la 30an de majo 2023 pro grava ikto en la malsanulejo Taulí, Sabadell. Ŝi aĝis 92 jarojn.

Maria estis la vidvino de Luis Serrano. Ili esperante konatiĝis per korespondado en la komenco de la 60aj jaroj, kiam li laboris en Francio kaj ŝi en Sabadell. Ili havis filinon kaj du

filojn, kiuj denaske aŭkultis iliajn gepatrojn parolante Esperanton. Ili ĉiuj komprenas la lingvon.

Maria kaj Luis estis la ĉefaj organizantoj de la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo sur la marbordo de Katalunio ekde la jaro 1995 ĝis 2016. Dum la aranĝo, Maria kutimis enkonduki la disdonon de la premio Ada Sikorska Fighiera.

Ŝi deĵoris preskaŭ la tutan tempon dum la Semajno kaj ankaŭ ŝatis pretigi la manĝeton por la Interkona Vespere kun ŝia dolĉa rideto.

Maria ĉiam estos en la memoro de la esperantistoj, kiuj renkontis ŝin.

Mian plej siceran kondolencan al la tuta familio. ■

PRI NIA KULTURO

Carlo Minnaja

Akademiano, matematikisto, eseisto kaj historiisto



Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo 2008. Libroservo.

Ke ni (kiuj “ni”?) havas propran literaturon diris jam la plej fruaj eseintoj pri la verkoj esperantlingvaj. Ne estis tiam polemiko, ĉu tiu estas esperanta literaturo aŭ literaturo en Esperanto: tio leviĝis longe poste, sed definitivajn starpunkton difinis Tonkin per *Lingvo kaj popolo* (UEA 2006, ankaŭ italogita de E. Belluco). Por la “ni” mi uzus “esperantanoj” rezignante pri la formo “esperantuloj” proponita de J. Camacho¹: ja *-an-* donas ideon de aparteno al grupo, dum *-ul-* indikas

¹ En “La arto labori kune – festlibro honore al Humphrey Tonkin”, UEA 2010: 521-528.

nur personan rilaton al la lingvo, kaj ni ja ne estas izoluloj.

Kiam ni parolas pri iu etnolingva literaturo, ekzemple la itala, ni celas literaturon verkatan de personoj kiuj kutime parolas la italan hejme, surstrate trafas al kiosko kun itallingvaj ĵurnaloj, iras al librovendejo kaj trovas plenan da italaj libroj (ne mankas fremdlingvaj fakoj, sed ne pli ol kelkaj bretoj); ŝaltado de radio aŭ televido trafas al itallingva programo, kaj, se la aĝo devigas viziti lernejon, ties instruistoj parolas itale. Ĉetable, ĝenerale surplade proponiĝas frandaĵoj el iu variaĵo de la mediteranea dieto.

Esperantano povas profiti nenion el tio; eĉ se hejme li (ŝli, ri²) parolas esperantlingve, eventuale eĉ denaske, Esperanto ne estas la lingvo de lia ĉirkaŭaĵo; maksimume okazas, ke ĉe ŝalto al la ret-poŝto, li trafas al plejparte esperantlingvaj mesaĝoj. Ja liaj ĉefaj amikoj estas esperantanoj kiel li mem, kiuj sin esprimas per lia sama lingvo kaj, ĉefe, naĝas en

² Eksperimenta uzado de sengenra pronomo, alternativa al la vira “li” ĝis nun uzata ankaŭ kiel sengenra. La Akademio, trastudinte diversajn solvojn, decidis, ke dum dek jaroj ĝi ne interesiĝos pri sengenra pronomo; tial uzado de “ri” restas aperta laŭ la plaĉo de la uzantoj.

medio al li konata. Tio sendube kaŭzas identecon en la difinita lingva kampo, identecon kiu aldoniĝas al aro da aliaj, kiuj fariĝas dumtempe pli aŭ malpli gravaj laŭ la cirkonstancoj, kiam temas pri nacio, familio, laboro, religio aŭ simple preferata ŝatokupo. Ni ne pretendas atribui nian esperantan identecon al aliulo kiu ne ĝin sentas, sed tamen ni obstine rezistas ĵaluzo kiam aliulo volas malagnoski la nian. Ne havas sencon envicigi identecojn laŭ graveco, ĉu pli gravas senti sin esperantano, aŭ italo, aŭ edzo, aŭ patro, aŭ zeloto de Juventus. Ĉiu identeco gravas laŭ la okazo: mi persone sentas min forte italo kiam temas pri sportaj konkursoj ordigataj laŭ landoj, kaj sentas min forte esperantano kaj membro de memelektita diasporo kiam mi revenas hejmen el E-kongreso, ĝisinte la geamikojn al venonta renkontiĝo. Se iu alia ne sentas sin tia, nu, li sentu laŭplaĉe, sed laŭ mi li maltrafas tre pozitivan emocion. Cetere, multo dependas de la spirita engaĝiĝo: mi estas denaskulo, oficiala salutinto ĉe Esperanto-kongreso kiam sepjara (ne temis pri tiam neekzistanta infana kongreseto), servinto en preskaŭ ĉiuj roloj de la movado junulara, nacia kaj internacia, doĵeno de la Akademio, kaj mi plu ordinare konversacias en Esperanto kun mia 85-jara frato.

Kiam oni volas kompari la literaturajn verkojn en Esperanto kun etnolingvaj, oni devas konscii pri tiu situacia malegaleco, ĉar nenio estas pli maljusta ol dividi egalparte inter neegaluloj. Pri la esperanta literaturo, post la ĝis tiam aktualaj kaj kompletaj ĉapitroj 5 kaj 6 de *Esperanto en Perspektivo* (ĉefred. Ivo Lapenna, UEA-CED 1974), verkitaj de la tiĉina patrolano³ Tazio Carlevaro, aperis nenio sufiĉe kontentiga dum kvardek jaroj, tiel ke la dufoje premiita *Historio de la Esperanta Literaturo* de Minnaja kaj Silfer (*HEL*, If-koop 2015) estas nun la sola ampleksa verko tiutema, kaj ne antaŭvid-

iĝas konkurantoj en baldaŭa tempo, ĉar ĝis nun aperis nenio alternativo aŭ aldono. Fakte tute ne alternativaj (eventuale nur komplementaj, se entute) enciklopedioj, kiaj *Ordeno de la verda plumo* de Pleadin (Grafokom 2006) aŭ *CEOLE* de Sutton (Mondial 2008) (ĉu entute konsiderinda malgraŭ alilingveco?), ja tute taŭgaj por siaj restriktaj celoj, nek la tre skrupule datenriĉa *Nia diligenta kolegaro* de Gorecka kaj Korĵenkov (Sezonoj kaj Litova Esperanto-Asocio 2018), ne limigita al literaturo: enciklopedioj fotas senmovajn scenojn laŭ alfabeto ordo, historio filmas fluantan impetan riveron.

Ĉiu submedio de la esperantorenkontiĝoj havas sian sion: UKoj vaste impresas per ĉerpo el multaj kulturoj tra universitataj kursoj, prelegoj de malsamnacianoj, artaj vesperoj diversstilaj, la Baltiaj Esperanto-Tagoj kunigas centojn da partoprenantoj el dekelko da landoj, la Festivaloj ĉe la Kultura Centro Esperantista en Ĉaŭdefono same proponas varidevenajn prelegantojn kaj artistojn: ni diru, ke la esenco de la esperanta kulturo estas, krom la renkontiĝoj en si mem, ĝuste la abunda ĉerpado el pluraj aliaj kulturoj. *La infana raso* aŭ *La konflikto de la epokoj*, aŭ *Vivo de Prometeo* aludas al konoj diversfontaj kaj diversfonaj; la kasedo *Horo da opozicio* (Edistudio 1979) de G. Molle kaj G. Cappa kunigas diversnaciajn kantojn; la plurdiskaj originalaĵoj de la itala kantaŭtoro Manŭel inspiras amon al la tuta homaro.

Ne malmulto estis produktita de la kabaredoj/kabaretoj⁴ en Budapeŝto kaj en Parizo, la spritaĵoj kaj kalem-buroj trempiĝas en la Esperantomondo; same la voĉojn de Georgo Handzlik, de Kajto, de JoMo aŭ de Miĥaelo Bronstejn ĉiu aŭskultanto komprenas, ĉar la ingrediencoj venas el la komuna kulturo.

Kompreneble ankaŭ nacilingvaj kulturoj ĉerpas de tempo al tempo el la

kulturo de aliaj: se menciis la italan, ĝi forte estis influata de la franca ĝis la dua milito, fortege de la usonangla ekde tuj poste, precipe pri muziko, sed temis pri greftoj, ne pri la esenco de la trunko, dum male la trunko de la esperanta kulturo estas ĝuste la diverseco de fontoj.

La okazoj de rektaj renkontiĝoj inter esperantanoj estas neoftaj, tamen post la pandemio la kontaktoj retaj iĝis preskaŭ normo: iuj ĝemelaj E-grupoj kunzomas unu fojon ĉiunmonate, la informa servo de UEA invadas la reton ĉiutage per longaj raportoj, kvazaŭ ĵurnalo. HeKo same ĵurnalisme raportas, kvazaŭ el kons-tanta opozicio.

Estante jam pli ol jardekon membro de juĝkomisiono pri la plej bona itala populariga verko komence en scienco, sed prekaŭ tuj transiĝinta al bele-tro, mi estas “kondamnita” al ĉiujara legado de plurmiloj da paĝoj en la itala pri libroj kaj artikoloj, kaj estinte dum ses jaroj juĝanto de la poezia konkurso “Poezio sub ĉiuj ĉieloj” kiu eldonis ĉiujare 50 konkurse gajnintajn poemojn tradukitajn al Eo aŭ italigitajn el Eo, (ĉ. tricento da poemoj ĉiujare, kutime), mi havas okazon legi kaj kompari. Nu, kompreneble ne kvante, sed kvalite, ne estas rimarkinda diferenco inter tiaj italaj verkoj kaj la E-lingvaj, ekzemple la astrofizikajn verkojn de Wandel mi klasus unuaj.

Estas ĝenerala plendo de aŭtoroj kaj eldonistoj, ke esperantanoj ne legas, kaj fakte libroj eldonataj en dumil ekzempleroj ŝimas jar(dek)ojn en depon-ejoj; en Esperantujo ni povas kalkuli je ne pli ol 100.000 kutimaj legantoj. Kiom intense ili legas?

Itala abituriento certe rekonas *Nel mezzo del cammin di nostra vita* (En mezo de la voj’ de vivo nia, tr. E. Don-di) kiel komencon de la Dia komedio de Dante Alighieri; mi ne scias kiom da esperantanoj rekonas *Naŭton mi himnos kaj universe faman arkeon* kiel la unuan version de la *Poemo de Utnoa* (1993) de Abel Montagut,

3 Noto de la Redaktoro: la Patrolo estis literatura rondo, fondita en 1969, kiu celis kunigi Esperanto-verkistojn kun komuna itallingva kultura fono.

4 PIV registris diverseldone ambaŭ formojn

kunfandiĝo de pluraj diversgentaj eposoj. Ajna italo tuj dirus, ke *M'illumino d'immenso* estas verso de Ungaretti, eble, sed ne certe, ajna esperantano scias ke *Enlumas min senlimo* estas ĝia esperantigo, titolo de tuta antologio de la italaj poetoj de la pasinta jarcento (lf-koop 1990).

La *Poemo de Utnoa*, laŭ recenzo de C. Deklerck en *Literatura Foiro* 141, 1993 disportas la internan ideon de “homaranismo kaj internacia humanismo”: fakte Utnoa predikas la savon de la homaro. Tiun saman ideon pluportas la dramo *Najbaroj* (2013) de Carmel Mallia (n. 1929), tre forte ligita al la interna ideo; tio ne surprizu: Mallia estas de la iamo longe for, kiam la interna ideo estis konsiderata la ĉefa celo de la lingvo.

La verkoj de Trevor Steele, elstara romanisto pri kiu baldaŭ aperos (ĉu jam aperis?) premiita eseo en *Belarta Rikolto* 2023, estas klare kontraŭrasismaj kaj kontraŭimperiismaj; tiujn same koloniajn aspirerojn firme kondamnas la satiro de *Vojaĝo al Kazohinio* (2a eld. 2021) de Sándor Szathmári; la ennestaj malbonaj kvalitoj de la homo estas klare piloriataj. La sola savo de la specio estas la sento de homa solidareco, kiun ofte regantoj hipokrite predikas, sed ne aplikas; la naturo estas la bazo de la homa vivo. Do en la esperanta kulturo oni rekonas iujn principajn trajtojn pri la homoj, la celon kiun ili plenumas kaj ilin konsumas. La homo, jes, la homo, kiu havas sian spegulan kontraŭspecion en alia parto de atingita insulo, la homo, kiun nobligas la renkonto kun alispecia “silanverino”, la homo, kiu instruas muzikon al talenta sed senrimeda knabo, estas la temo de homama romano, subtitole klasata kiel kvarmana sonato (leganto, ĉu vi rekonas ĝin?). Kaj ankaŭ la aro nudpieda, persekutata sub la fulmoj

brile bluaj, sub frapad' de gutoj fluaj, estas la homaro, trairona la diversajn statojn de evoluo, al kiu ankaŭ la lupu subiĝas kaj intimiĝas. Homo pacas kun la naturo kaj siaj similuloj; tiajn homomodelojn proponas la esperanta kulturo.

Kompreneble, ne ĉio estas optimisma: post esper' la malprosper', kaj estas mond' kaj restas mond' malĝoja kaj malbona; nur unu gast', feliĉo, ĝis nun min ne vizitis. Sed ni ne malesperu: eĉ se ĉiel' kitele pezas sur la kapo, ankoraŭ io devas veni, kaj malgraŭ ĉio iu poeto (kiu?) pasie sklavas al Eo: “la sorto mia estas ligita al vi per kateno”.

La esperanta kulturo ĉerpas el la tuta mondo: ekzemple, ĝi diskonigas, ke bulgara pipro “ĉuska” estas tre embuska al stomaka vento, kaj ke la dana popolo estas pli feliĉa ol ĉiuj sub suno, ĉar naskita en lando kun horo je dekunu montranta dekunu; tial ni la lingvon de l' espero uzu kun fiero kaj samideana ĝu'.

Alia problemo pri la ne vasta kono de nia kulturo estas recenzado, pli ĝuste, la absoluta manko de recenzoj. Kiam mi disponigis min lastatempe al recenzado por la UEA-revuo, la redaktoroj prezentis al mi liston de 678 (sescent sepdek ok) verkoj atendantaj recenzon, el kiu mi elektu laŭplaĉe. Do revuoj, eĉ tiuj aperantaj ofte kaj akurate, kiel *Esperanto*, *Monato*, *Literatura Foiro*, dediĉas al recenzado tro malmulte da paĝoj kompare al aperantaj verkoj.

Kara leganto, se vi atingis ĝis ĉi tie, mi vin demandas, kiom da kaŝitaj citaĵoj el la esperanta literaturo vi rekonis en la supraj linioj; ili estas, ne eksplikitaj, dekduo, el naŭ verkistoj; se vi ne rekonis, ne gravas, certe vi havis pli gravajn aferojn farindajn, do mi vin salutas kaj nun for, al voĵ?... (kiel vi kompletigus?...)

”

Kiam oni volas kompari la literaturajn verkojn en Esperanto kun etnolingvaj, oni devas konscii pri tiu situacia malegaleco, ĉar nenio estas pli maljusta ol dividi egalparte inter neegaluloj

”

Ne malmulto estis produktita de la kabaredoj/kabaretoj en Budapeŝto kaj en Parizo, la spritaĵoj kaj kalemburoj trempiĝas en la Esperantomondo; same la voĉojn de Georgo Handzlik, de Kajto, de JoMo aŭ de Miĥaelo Bronstejn ĉiu aŭskultanto komprenas, ĉar la ingrediencoj venas el la komuna kulturo

”

Revuoj, eĉ tiuj aperantaj ofte kaj akurate, kiel *Esperanto*, *Monato*, *Literatura Foiro*, dediĉas al recenzado tro malmulte da paĝoj kompare al aperantaj verkoj

DU SONETAROJ – NIA UNIKA TREZORO

Valentin Melnikov

Membro de la Literatura sekcio de Akademio de Esperanto

En 1932 aperis la unua eldono de “Sekretaj sonetoj” – ŝokigaj por tiama pruda publiko, tial subskribitaj per pseŭdonomo Peter Peneter: la aŭtoro, nia plej elstara poeto Kálmán Kalocsay ne riskis elmeti sian reputacion al ebla skandalo. Tamen oni sufiĉe baldaŭ eksciis la aŭtoron.

La temo estas eterna kiel la vivo mem: la amo. Tamen neniu alia poeto ekde Petrarca ĝis nun aŭdacis paroli pri amo tiamaniere. Klasika, senriproĉa formo de 52 sonetoj, 2 rondeloj kaj balado-epilogo (la virtuoza poezia tekniko de la aŭtoro konas ĉiuj!) prezentas tute eksterordinaran enhavon – “la ardan amon trans ĉemizo”, tute malkaŝe priskribas plenan historion de la amo: ekde la konatiĝo dum balo tra rendezuoj, intimaj karesoj ĝis geedziĝo kaj genero de la filo.

La moroj iom post iom mildiĝis kaj liberiĝis, la sonetaro, ŝatata de legantoj, estis plurfoje reeldonita kaj nun libere legeblas en interreto (plej oportunas la retejo egalite.hu) – do vaste konata. Ĝi prezentas amon kaj amoron el vidpunkto de viro. Tamen, ja ankaŭ virino povas rakonti pri la temo el sia vidpunkto...

Nur en 2002 aperis la virina “respondo” (verkita, tamen, en 1954): sonetaro “La sekreta psiko”, lukse eldonita kun eta eldonkvanto kaj ega prezo –

do longe restinta apenaŭ konata por legantoj. Same pseŭdonoma subskribo – Evo Sveti Vrag (kio en la kroata signifas: “Jen sankta diablo”), same senriproĉa poezi-tekniko, da sonetoj estas 77. Ĉi-foje oni identigis la aŭtorinon nur post jardekoj, jam post ŝia forpaso: estas Marjorie Boulton. Jen nekonita branĉo de ŝia kreado... Finfine ankaŭ la virina sonetaro nun troviĝas en interreto: serĉu ĉe libro.ee.

Indas do kompari la du sonetciklojn, por eble ricevi kompletan, kvazaŭ stereoskopian bildon...

Sama sincereco, malkaŝo de plej intimaj detaloj – tamen nenia maldeco, ja temas pri vera amo. Komparu la enkondukojn (ĉi tie kaj plu maldekstre estas vira verko, dekstre la virina):

Leganto, se vi estas pruda,
kaj naŭzas vin la amo nuda,
se indignigas vin la bolo
de la temperamento suda,
se ĝenas vian delikaton
la grimaceto amo-luda,
pripensu bone antaŭ lego:
tute ne estas mi altruda,
forĵetu min, retiru vin
al via dika ŝel’ testuda.

Se verkas mi pri idilio
de amo, kaj sen fig-folio,
kaj verkas verve pri plezuro
sen eŭfemismo kaj cenzuro,
ne verkas mi por aĉe moki
la karnan amon, nek por ŝoki;
ne estas mia Muzo truda,
kaj se vi estas eble pruda,
vi povas gardi ekvilibron
kaj ne tralegi mian libron.

Tre simile, ĉu ne? Tamen ne vane oni diras, ke viro kaj virino estas kvazaŭ diversaj mondoj, kvazaŭ devenantaj de diversaj planedoj. Virinoj troviĝas en pli riĉa, pli multdimensia mondo de profundaj sentoj. Ĉio ligita kun amrilatoj okupas multe pli gravan rolon en la vivo ol por ni viroj – ĉar ja virino respondecas pri daŭrigo de la vivo, por plejmulto de virinoj tio estas la plej grava afero...

Viron zorgigas nur la maniero konsentigi virinon kaj fiziologia kapablo efektivegi seksumadon, sed fraŭlino revas pri romantikaĵoj eĉ longe antaŭ la unua korpa kontakto. Kvar sinsekvaj sonetoj rakontas nur pri unua kiso, kaj kisoj postaj – dum viro nur pretere mencias tion en ses verslinioj, li jam revas pri multe pli intimaj agoj.

La rilatoj evoluas, kaj jen – defloro, la unua seksumado.

Kaj venis vi kun la kompreno takta,
ridetis vi, ho, admirinda saĝ!
Trafluis miajn membrojn la kuraĝ',
neniam estis ŝvelo pli kompakta. Nun, nun,
rapide! Inter blanko lakta
jam ombre silkis la sopir-pejzaĝ',
kaj vokis, vokis por plezur-vojaĝ'
tra la misteroj de la grot' barakta.
Rompiĝis pordo! Post dolora ĝem',
kiel pafita eta korpo birda
vi kuŝis svene kun tutkorpa trem'!
Ho, kara, kara! Ho viktimo virga!
La Bubo brulis en la ĉirkaŭprem',
kontuze pro la strikta vojo smirga.

Nur kelkaj movoj – la volupto plenis.
Mi rigidiĝis kun ekstaza trem'.
Dum vin inundis mia ama sem',
sur via svena korp' mi preskaŭ svenis.
La sangan glavon milde mi reprenis,
la vundon kisis mi kun karesem',
kaj vin karesis, ĝis kun laca ĝem'
via konscio ree al vi venis.
Nun vian manon kisis mi kun danka
kortuŝo pri la oferita riĉ'
kaj mi rigardis al la tolo sanga,
kiel la idolano al fetiĉ':
ho, jen standardo sankta, ruĝa-blanka,
standard' de mia gloro kaj feliĉ'!

Post longa, lerta, dolĉa karesado
li subentiras la kalsonon; ŝi
demetas la korseton. Agoni'
de martirin' streĉita sur la rado!
La frato, patro, filo, kamarado,
kunulo en senfina simpati',
mafermas vulvo-lipojn, kaj kun kri'
ŝin ŝiras per l' eningigita spado,
plur-foje puŝas enen. Kaj doloro
ali-formiĝas ĝis ekstaza gloro,
lumigas ŝian frunton, kaj detruo
mallonga iĝas ĝojo infinita;
ŝi pensas, pro videbla lia ĝuo:
“Por vi, jen mia korpo frakasita.”

Ruĝaj flagetoj, kvazaŭ por salutoj
al la Venkinto, sur la tol' aperas,
etan doloron strangan ŝi suferas,
sed ĉe la vido de la ruĝaj gutoj,
– de malkuraĝo ina la refutoj –
ŝi ĝojas kaj triumfas, ŝi fieras;
la sakramenta sango regeneras
la geamantojn; gutas la tributoj
al Afrodito. Apud ĉi purpuro
triumfas nova sento de maturo,
kaj ŝi fieras pro la tolerivo.
Li kuŝas nun en elĉerpita laco,
sed kvazaŭ sigel-vakso de la vivo,
guto da sango brilas sur la kaco.

Por li – la ĝoja venko (eble eĉ iam sekvos pliaj tiaj), por ŝi – renverso de tuta vivo, fonto por longaj meditoj... Poste, feliĉe, stabilaj rilatoj kun komuna ĝuo, sed – vidu la percepto-diferencon:

Monatoj de eterna ebrieto!
Soif' eterna kaj eterna sorb'.
Ni sentis nur en karna kroĉ' de korp'
la vivon; krome estis nur vegeto.
Kiel altiras feron la magneto,
tiel altiris al la fea bord'
kompason mian via arda Nord'
por la plej dolĉa speco de dueto.
La dolĉan fortikaĵon per sieĝo
mi prenis kampe, inter timian',
sur fojno, nuda tero kaj en neĝo,
malantaŭ pordo kaj post la ekran',
en lito kaj sur sofo kaj sur seĝo,
kaj sur tapiŝo sub fortepian'.

Sendube scias vi, am-spertaj viroj,
ke ni virinoj ofte eĉ en nupto
pro nia tim', nesperto, aŭ abrupto
de vi, ho karaj, strangaj kavaliroj,
ne trovas plen-plenumon de deziroj,
ne konas plenan pinton de volupto,
kiel vi trovas en la sem-erupto,
ne ĝuas ĝis satiĝo post sopiroj...
Sed kie estas amo, ne tre gravas
la manko, ĉar trezoron ni ja havas.
Vin senti tiel varme kaj intime
en ni, profunde, estas eĉ sufiĉa;
nur pro l' miraklo tiel plejproksime
kuŝi, virino estas tre feliĉa...

Sekvas diversaj karesoj kaj plezuroj – priskribataj tute sincere kaj malkaŝe. Nur po unu ekzemplo:

En lit' vi bubviziton ne permesis,
rezigne flustris: "La monata sang'".
Sed malkvietis spite mia stang',
vi ĝin karesis mole. Sed ne ĉesis
la ŝvelo, kompreneble, eĉ impresis
jam obeliske. Nun kun brula vang',
vi proksimiĝis al ĝi kaj per lang'
kaj lipoj vi ĝin milde ekkaresis.
Kaj nun eksuĉis vi entuziasme.
Ho, dolĉturmenta vibro en la nuk'!
Volupto torda, morda! Dum orgasmo
en vian buŝon ŝprucis arda suk',
barakte, ĝeme, senkonscie, spasme
mi mordis vin je l' alabastra pug'!

En lit' denove, kaj kun sango bola,
ŝi sentas lin en sia ingo streta;
dum li esploras ŝin per puŝ' impeta
ŝi trovas ion. Rida, senparola,
ŝi premas lin per eta ring' muskola;
jen, do, kares' interna, pli sekreta
ol ia ajn alia; per ripeta
premo ŝi pinĉas lin per ring' petola.
Ho nova ĝojo, preter ŝajna limo!
Mirinda interkono kaj intimo!
Ho senfinco de la amaj artoj!
Unu alian al kuniĝo logas –
kiel delice l' plej sekretaj partoj
interkomprenas, dolĉe dialogas.

Kompari oni povas longe. Jes, viro kaj virino perceptas la mondon diverse. Sed krom tio, ĉiu homo havas sian sorton, ne ekzistas tutsamaj homoj kaj tutsamaj situacioj. Al la protagonisto de la viraj sonetoj bonŝancis: li edziĝis al sia amatino, al ili naskiĝis filo. Sed la virinon la sorto ne kompatis. "Ŝi staras ĉe la telefon', senvorta. / Hodiaŭ... en la strato... akcidento... / Li estas morta." Al ŝi restas nur la memoro. "La lumo estingiĝis sur altaro. / Sed restas lia bildo en animo... (...) Valida estis amo; kaj ŝi restas / inter la feliĉuloj de la mondo."

Jes, ekde 1932 kaj 1954 la moroj ŝanĝiĝis, tre liberiĝis. Eĉ tro. Kaj la vorton "amo" oni nun ofte uzas malkonvene, ankaŭ kiam reale temas nur pri obseda seksdeziro. Do relegu la admirindajn sonetojn, por trasenti kaj plummemori – kio estas vera amo...

Ho, ne koleru, ke mi vin priversas
en la baraktoj de l' volupta sven'!
Ĝi estas sankta don' kaj sankta pren',
la vera am' neniam ja perversas.
Kaj ĝiaj vojoj kiel ajn diversas,
ĝi estas la plej alta tera ben';
se ĝi nin portas en torenta trem',
ja ĉiujn homrezonojn ĝi renversas.

Oni ne devas ami, kvazaŭ terni –
ne estas ĝi afero de lascivo
kruda kaj besta, aŭ senvola drivo
sin simple sur la lito stulte sterni;
ne! oni devas ĝin pripensi, lerni,
scii pri pli ol simpla pramotivo,
por ĝui ĉiun floron de la vivo,
por ke amoro povas ja eterni... ■



**Trovu vian deziratan libron
en la libroservo de KEA**

libroservo@esperanto.cat

POESIA, SENSIBILITAT I SORPRESA

POEZIO, SENTEMO KAJ SURPRIZO

Ramon Perera

Enginyer enamorat de l'esperanto



Sube en esperanto el la vidpunkto de eksteruloj.

Benvolguts llegidors que sabeu esperanto, que l'estudieu o que no hi teniu interès, el llibre que teniu entre mans és un regal per gaudir de la poesia o per descobrir-la. Encara que no sentiu una especial inclinació per l'esperanto, sí que podeu fruir de la poesia del llibre. Això és així perquè el llibre és original en català, sense relació amb l'esperanto. Però les traduccions a l'esperanto generen nous originals (si estan ben fetes, i aquesta ho està) dels quals xalen els que coneixen la llengua internacional.

Com deia el meu professor de literatura a l'institut, les obres literàries ben fetes es poden llegir en distints plans i a *Poemes, relats i marietes* passa així. Vegem-ho.

La sensibilitat de l'autora hi ha posat versos i metàfores de les quals els infants poden gaudir. Una mostra:

*La mà de l'enxaneta
és una estrella
de cinc puntes
que corona*

*el cel
d'un dia de castells.*

O també la història d'aquella marieta que vivia feliç, però un dia es va adonar que li faltava companyia. Després d'una recerca delerosa i frustrant va aparèixer de manera sorprenent la companyia desitjada.

I què poden trobar-hi els adults? Doncs també continguts sorprenents, vistos amb la mirada molt personal de l'autora:

“Aquesta mirada «de cine» topa amb la meva. S'adona que deu fer una bona estona que estic allà observant-lo de manera discreta i callada.

Superada la sorpresa, amb tota naturalitat, em regala un esguard lluminós i un somriure còmplice, agraït i un xic burleta.”

I qui era l'altra persona en aquesta trobada real de l'autora? Ralph Fienens. En el llibre hi trobareu la història sencera.

Però encara n'hi ha més, de continguts dels quals poden gaudir els adults i que també poden llegir els infants.





Les traduccions habituals de les obres literàries solen respondre a interessos comercials, però les de l'esperanto, no. Així, d'on surt aquesta traducció? Lola Casas no explica d'on li ve la simpatia per l'esperanto però sí que fa molts anys va descobrir un company de feina que el sabia parlar. Durant molt de temps va seguir escrivint poesia en català sense deixar de pensar en l'esperanto. I és que l'esperanto és un sentiment que no es marceix amb el pas del temps. En un moment determinat l'Alfons Tur va fer la traducció, però aquesta només fou presentada, de forma llegida, durant el 37è Congrés Català d'Esperanto, celebrat a Mataró. Finalment n'ha arribat l'edició en forma de llibre.

I els dibuixos?

Són allà, sense imposar-se, com si tinguessin vergonya. Però tradueixen al món visual la sensibilitat poètica de la Lola. Si no hi fossin es trobarien a faltar. La marieta juganera no s'ha oblidat dels lectors i ha volat fins la tapa per donar-los la benvinguda.

Karaj esperantistoj el eksterlando, tie ĉi ne temas pri traduko en esperanto de la antaŭa recenzo en la kataluna, sed pri rigardo el ekstere de poem-libro el kataluna kulturo. Eble en via kulturo neniu poeto imagis poezian ligan inter suno, semaforo, eleganta sinjorino, ĉerizo, kapsiko kaj klaŭno. Ĉu vi volas provi? Vi povos kompari vian solvon *kun tiu de la aŭtorino*.

Vi trovos apud belaj metaforoj ŝataj ankaŭ de infanoj: Avinjo, Kial ruĝas la sango?

Ĉar el la tuta florbunto

elektis papavan brilon kaj ruĝon.

rememorojn de mondaj tragedioj [Sieĝo de Leningrado]:

La ĉielo,

fortimigo

de blanka ruino

suferadurbo

vitra neĝo

kaj malhela morto.

Eble Katalunio estas por vi fora lando kaj tamen vi scivolos pri ĝia kulturo. Vi trovos ekzemplon: la "gigantojn". Gigantoj surstratiĝas dum ĉefaj festotagoj kaj dancas:

La jupo kaj la mantelo turniĝantaj kiel birdegaj flugiloj.

Brila kasko kronita de aroganta aglo.

Malhela kaj densa barbo.

Ĉi-kaze temas pri la giganto Fabŝtelulo, el la kataluna urbo Mataró. Tradicioj rilate gigantojn ekzistas ankaŭ en aliaj kulturoj, sed malmultaj.

Ĉu vi decidis aĉeti la libron? Agrablan legadon al vi. ■

HOME EN RUÏNES

DE JAUME GRAU CASAS: LA RESTITUCIÓ D'UN TESTIMONI EXCEPCIONAL

Carles Biosca

Traductor d'Home en ruïnes

No necessita presentació en aquestes pàgines en Jaume Grau i Casas, conegut arreu com a autor de la *Kataluna Antologia* de 1925. Jaume Grau s'exilià el gener de 1939, i a Argelers començà un periple de cinc anys per diversos camps d'internament del sud de França. Impedit de treballar per qüestions de salut, ocupà el temps i la ment recollint per escrit la situació dels camps, descrivint-ne moments, vivències i individus, fent-ne una crònica exhaustiva, tan crua com directa, que abraça cinc anys d'incertesa i calamitats. Diversos fets, dates o persones l'animaren també a compondre un seguit de poemes, sense claudicar mai davant la penúria dels camps (manca de tinta, de paper, d'estilogràfica i fins de llum per escriure) que l'obligava a gargotejar en bocins de paper, sovint pàgines reciclades, que anava traginant en una maleta, d'un barracó a l'altre, procurant salvar-los dels rosegadors.

Les autoritats dels camps llegien i censuraven tant la correspondència com els escrits personals dels in-

terns. Era prohibit, doncs, d'escriure en llengües que els funcionaris no poguessin entendre. Jaume Grau es veié així impedit de fer el seu dietari en català i va haver de recórrer al castellà, un castellà un xic encarcerat, amanit amb citacions de la literatura escolar, del teatre i la cultura popular, però també amb les expressions castisses dels seus companys de reclusió. També l'esperanto hi apareix de tant en tant, com a llengua íntima, llengua que el vincula als *samideanoj*, d'on li arriba gran part del seu consol moral i material. La llengua espanyola, interposada per força entre l'esperit i el paper, desvirtua sovint l'emoció que s'amaga rere les paraules d'en Jaume, i en moments molt concrets, el català (o l'occità) hi treuen el cap, malgrat tot, per expressar la genuïtat d'un sentiment, d'un afecte, d'una nostàlgia.

Aquest memoràndum extraordinari s'ha conservat, de miracle, fins avui. I devem a la Marie Hélène Melendez la complicada tasca de transcriure'l i traduir-lo al francès amb el títol *Ulysse dans la boue* (2014). Poc

després se'n publicà una traducció a l'esperanto, obra de Miguel Fernández, *Tagoj kaj runoj* (2017). Mancava, però, la versió primigènia, una versió catalana, que ara, gràcies a la tenacitat del servei de publicacions de l'Associació Catalana d'Esperanto, veu la llum sota el títol de *Home en ruïnes*. En aquesta edició hem procurat restituir un original probable, al més fidel possible al text que en Jaume hauria escrit sense el veto lingüístic. És per això que no hem modernitzat ni lèxic ni sintaxi d'un text que té ja prop de vuitanta anys de vida. Hi hem conservat, doncs, formes avui dia poc emprades però corrents a l'època, reforçades sovint per la coincidència amb el francès. La influència del francès hi és cada cop més present. En Jaume té ben pocs companys amb qui pot parlar català. I així, per exemple, quan al camp apareixen les preuades nyàmeres, no sap com dir-ne i s'hi ha de referir amb el mot francès: *topinambours*.

Com molts esperantistes, en Jaume fou un apassionat del contrast entre llengües, de les etimologies i dels



jocs de paraules. En la barbàrie dels camps, trobar sentit a determinats conceptes o etiquetes esdevé una quimera, i l'etimologia (real o irònica) hi ajuda. Tanmateix, una omisió sobrevola aquesta crònica. Imperceptible d'entrada, es va fent més i més patent a mesura que l'obra avança: en Jaume no troba un mot, un subjecte, per referir-se als seus companys de reclusió. I expressa l'indefinible amb un mot indefinit: *un de nosaltres, un amic, un andalús, un hongarès, un barber*, o, simplement, *un* (*un n'hi ha que reparteix taronges*). Es nega, irònic, a fer servir els eufemismes que govern i funcionaris intenten imposar: *intern* i *albergat*.

Vet aquí una crònica immediata, escrita directament als camps de refugiats, un testimoni no tan sols històric sinó també literari, que gràcies a la KEA veu la llum, finalment, en la llengua en què va ser concebut. ■



**La libroj recenzitaj
en *Kataluna Esperantisto*
estas mendebraj
de la Retbutiko de KEA**

butiko.esperanto.cat

REVIZIINDA EKZOTISMO

Maria Bardají i Farré

Membro de la Grupo de Lingvistoj por Diverseco (GLiDi)

Tradukis Alfons Tur

La parolantoj de la mangaraja, aŭstralia indiĝena lingvo, estas lege pli precizaj ol ni, kiam ili parolas. En tiu lingvo nepras indiki la verecon de la senditaj informoj. Kiam oni volas kunhavigi aŭditan aŭ deduktitan fakton, oni ne rajtas transdoni la informon, kvazaŭ oni mem vidis tion. Se, ekzemple, mangaraja parolanto vidas malsekan teron aŭ aŭdis diri ke nokte pluvis, kiam li volos tion sciigi, li devos uzi specifan morfemon kiun li ne bezonus se li estus vekiginta dum la pluvo. La frazo, akompanita de tiu morfemo, tradukeblas kiel “evidentas ke ĉi-nokte pluvis” aŭ “onidire ĉi-nokte pluvis, kvankam mi ne povas tion certigi ĉar mi ne vidis”. Tio ne signifas ke en la mangaraja ne eblas mensogi, sed simple ke la informoj kiuj ne estas el nia propra percepto oni devas morfologie marki. Sed mangaraj-parolantoj ne nur parolas kun ekzaktecio tiurilate. Alian ekzemplon oni trovas en la uzo de la pronomo “ni”. Kiam ili diras “hodiaŭ ni iros en la riveron”, oni povas uzi pli ol unu manieron diri “ni”: unu ekskluzivan, alian inkluzivan. Se ili uzas la ekskluzivan formon *ŝaya*, ili montras al la alparolato ke oni ne inkludas lin en tiu “ni”. Tio estas, *ŝaya* povas esti mi kaj iu ajn alia (mia edzo, mia najbaro, mia kuzo ktp.), sed *ŝaya* ne inkludas vin, alparol-

aton. Tamen, se la parolanto uzas la inkluzivan formon *ŝaĵa*, tiu “ni” inkludas ankaŭ la alparolaton. Tio estas, *ŝaĵa* signifas “vi kaj mi”. Danke al tiu sistemo la parolantoj de la mangaraja evitas miskomprenojn pri tio, kiu estas invitita kaj kiu ne.

Estas vere escepta lingvosistemo, tiu de la mandaraja, ĉu ne? Tamen ĝi tute ne estas escepta. Kaj la morfemoj uzitaj por montri la informfonton (nomataj evidentigiloj), kaj la uzado de pli ol unu persona plurala pronomo en la unua persono estas trajtoj kiujn oni trovas en multaj lingvoj. Ne nur en Aŭstralio. Nur kiel ekzemplo, ambaŭ fenomenoj troviĝas en la gvarania lingvo (Argentino, Bolivio, Paragvajo), ĉamora (Gvamo kaj Marianaj insularoj), komanĉa (Usono), abĥaza (Abĥazio), garoa (Barato kaj Bangladeŝo)... Kiel oni povas vidi en la atlaso WALS¹ (World Atlas of Language Structures), la evidentigiloj kaj la distingo inter inkluzivaj kaj ekskluzivaj pronomoj estas tipologie komunaj karakterizaĵoj. Tio signifas ke oni renkontas ilin en pluraj malsamdevenaj lingvoj. La nura kialo kiu pensigas nin pri tio, ke temas pri ekzotaj trajtoj, estas la fakto ke ni ne trovas ilin en nia lingvo nek en la lin-

gvoj kutime lernitaj de la eŭropanoj, kiel la angla aŭ la germana.

Fakte mankas al ni perspektivo. Lingvistiko delonge suferas eŭrocentrismon kaj, ĉefe, anglocentrismon. Kaj tio ĉi ne estas eta problemoj, male tio gravas kaj influas la sciencecon de la fakto. La psikologoj Heinrich, Heine kaj Norenzayan atentigis en artikolo² ke la homgrupoj kiujn oni prenas en konsidero en la studoj pri psikologio kaj homa konduto (multaj el ili derivitaj de lingvistoj) estas la plej maltaŭgaj por estigi ĝeneraligojn pri la homaro. La aŭtoroj priskribas tiujn sociajn tipojn per la akronimo WEIRD, angle signifanta “stranga”, kaj rilatas al Western Educated Industrialized Rich and Democratic Societies, tio estas, la okcidentaj socioj, edukitaj, industriigitaj, riĉaj kaj demokratiaj. Kvankam estas diskutinde ĝis kiu punkto tiu akronimo ankaŭ ĝeneraligas, la artikolo montras per diversaj eksperimentoj kiel la WEIRD-socioj reagis neordinare en areoj kiel la vidpercepto, decidopreno aŭ spaca priskribo. Tial, kiu ajn

1 <https://wals.info/feature>

2 <https://www.cambridge.org/core/journals/behavioral-and-brain-sciences/article/abs/weirdest-people-in-the-world/BF84F7517D56AF-F7B7EB58411A554C17>



STEVE EVANS

ĝeneraligo pri la homaro surbaze de studo de la WEIRD-socioj riskas esti ne-reprezenta aŭ eĉ falsa.

Evidentas, do, ke la sociolingvistikaj studoj devus revizii sian reprezentan valoron laŭ la studataj socioj. Sed, ĉu ni renkontas la saman problemon en la analizo de la gramatikaj strukturoj, sendepende de la mondo en kiu ni vivas? Tute same. Michael Cysow, en studo de 2011, esploris la geografian distribuon kaj filogenezon de la plej maloftaj lingvaj trajtoj. Por tiu studo, Cysow enkondukis tion, kion li nomas “strangec-indico”, indicon priskribantan la nivelon de ĉieesteco de la ejoj de lingvo, lingva grupo aŭ geografia areo. La rezulto montris ke unu el la geografiaj grupoj kun la plej alta nivelo de strangeco estas la lingvoj de nord-okcidenta Eŭropo (angla, germana, franca, nederlanda, frisa...). Paradoxse, tamen, la plimulto de la anoj de tiu grupo staras inter la plej studataj de la planedo.

La “strangaj” trajtoj de tiuj lingvoj ne estas etaj ekstravagancaj detaloj. La listigo de Cysow entenas tiel bone konatajn aferojn (el nia perspektivo) kiel, ekzemple, la ordoŝanĝo de la elementoj en demandofrazoj (angle “*you are tired*” estas deklarativa frazo, dum “*are you tired*” estas de-

mandofrazo) aŭ la perfektivaj verbaj formoj konstruitaj pere de la verbo *havi*, kiel en la franca (kaj ankaŭ en la kataluna) “*j’ai fini*”, “*he acabat*”. La akcepto de tiuj ecoj de la eŭropaj lingvoj, ĉefe de la angla, kiel normoj kaŭzas al ni malĝustan bildon de la realo. Majid kaj Levinson montras bonan ekzemplon³. Delonge oni diras ke la parolantoj de iu lingvo *ne distingas* inter tiu koloro kaj tiu ĉi, ke iu lingvo posedas *nur* kvar vortojn por nomi la kolorojn aŭ ke tiu alia lingvo *ne* havas vorton por konkreta koloro. Tamen, eŭropaj lingvoj estas la plej apartaj en tiu aspekto, ĉar la nombro de kategorioj en kiuj ili dividas la koloran spacon estas pli alta ol en multaj (sed ne en ĉiuj) lingvoj de la mondo. Antaŭ tiu fakto, eble ni devus rekonsideri la pli fruajn priskribojn kaj anstataŭ paroli pri manko de

vortoj en multnombraj lingvoj, ni devus paroli pri *ĉeesto de multaj* terminoj ĉe la eŭropaj lingvoj (kaj en kelkaj neeŭropaj, kiel la korea).

Finfine, evidentas ke la lingvistoj disponas pri multe pli da donitaĵoj pri la eŭropaj ol pri la lingvoj de la aliaj

kontinentoj. La alireblo al la eŭropaj lingvoj igas ke ilin oni studas pli ofte kaj ili estas pli reprezentitaj en la tipologiaj studoj. Tio ne signifas ke ilia studo estas nek pozitiva nek necesa. Tio evidencigas ke nepras plilarĝigi la studbazon kaj direkti

nian atenton al la vera diverseco. La antidoto kontraŭ eŭrocentrismo estas lingva priskribo. Ju pli da lingvoj oni studos kaj priskribos, des pli kompleta kaj vereca estos la bildo kiun ni povos fari de la homa lingvaĵo. Sed nur tio ne sufiĉos. La studo kaj lingva priskribo devas akompani ŝanĝon de vidpunkto. Necesas forlasi la anglan aŭ la ĉefajn eŭropajn lingvojn kiel referencilojn. Tiel ni ne konsideros escepta tion, kio fakte ne estas tia. ■

”

Necesas forlasi la anglan aŭ la ĉefajn eŭropajn lingvojn kiel referencilojn. Tiel ni ne konsideros escepta tion, kio fakte ne estas tia

³ Jen la artikolo: https://www.researchgate.net/publication/44671874_WEIRD_languages_have_misled_us_too

ANGULO POR ETERNAJ KOMENCANTOJ

Pedro M. Martín Burutxaga
Lingvemulo

Abans la gent vivia en un contacte més estret amb la natura, i això incloïa els animals, tant salvatges com domèstics. Per això no és gens estrany que la presència d'animals al refranyer de qualsevol llengua sigui prou important.

A continuació us proposo de completar una vintena de refranys de l'esperanto amb l'animal correcte de les quatre opcions que us dono. Abans de cada dita també he afegit un possible equivalent català que us pot ajudar, però no us en refieu massa, de vegades les coses no són tan fàcils com semblen.

Trobareu les solucions a la pàgina 45.

1. A on van les abelles? A la mel.

- Kie estas mielo, tie ne mankas.
 - a) abeloj b) katoj
 - c) muŝoj ĉ) ursoj

2. A tothom plau el seu cant i el seu infant.

- Ĉiu sian voston laŭdas.
 - a) azeno b) hundo
 - c) kato ĉ) vulpo

3. Brams d'ase no pugen al cel.

- La luno ne aŭskultas, kiam ĝin insultas.
 - a) azeno b) bovo
 - c) hundo ĉ) porko

4. D'on no n'hi ha, no en pot rajar.

- Nenia peno nek provo donos lakton de
 - a) bovo b) koko
 - c) porko ĉ) vulpo

5. Dels escarmentats neixen els avisats.

- Saĝa post la vundo.
 - a) hundo b) lupoj
 - c) urso ĉ) vulpo

6. Dos ocells en una espiga no fan lliga.

- Ne taŭgas du por unu nesto.
 - a) bestoj b) birdoj
 - c) paseroj ĉ) ursoj

7. El dot fa la núvia maca.

- Eĉ plaĉas, se la doto suficás.
 - a) bovino b) kaprino
 - c) hundino ĉ) porkino

8. El llop muda les dents, però no els pensaments.

- ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn.
 - a) hundo b) lupoj
 - c) urso ĉ) vulpo

9. El més calent és a l'aigüera.

- La manĝota estas ankoraŭ en la rivero.
 - a) ansero b) fiŝo
 - c) kokino ĉ) pasero

10. Gos que lladra no mossega.

- krias fiere, sed ne danĝere.
 - a) bovo b) hundo
 - c) koko ĉ) rano



11. Infant ben criat no parla si no és preguntat.

- Infanoj kaj voĉon ne havas.
 - a) azenoj b) fiŝoj
 - c) katoj ĉ) muŝoj

12. La cabra sempre tira a la muntanya.

- sopiras, al arbaro sin tiras.
 - a) kapro b) lupoj
 - c) urso ĉ) vulpo

13. No és per tu, sinó pel pa, que remena la cua el ca.

- Pro amo al la kandelo lekas la kandeligon.
 - a) hundo b) kapro
 - c) kato ĉ) porko

14. On hi ha gall no canten pollets.

- Al la ovo lecionojn ne donu.
 - a) birdo b) koko
 - c) kokino ĉ) pasero

15. Ovelles comptades el llop se les menja.

- kalkulita ne estas savita.
 - a) ansero b) bovo
 - c) kapro ĉ) ŝafo

16. Per forĉa els pengon.

- Ne volas al festeno, sed oni ĝin trenas perforte.
 - a) anser' b) bovin'
 - c) kokin' ĉ) pork'

17. Qui tria massa, tria malament.

- Elektadis sen fino, edziĝis kun
 - a) bovino b) hundino
 - c) kaprino ĉ) porkino

18. Tira més un pèl de dona que cent mules.

- Pli tiras virina haro ol paro.
 - a) azena b) bova
 - c) ĉevala ĉ) ursa

19. tossut com una mula

- Obstina kiel
 - a) azeno b) bovo
 - c) kapro ĉ) porko

20. Tot bon cavall ensopega.

- Eĉ plej ruza en kaptilon falas.
 - a) besto b) kato
 - c) lupoj ĉ) vulpo ■

CAROL FORNÉ: «Vull subratllar la importància de no perdre de vista la necessitat d'una perspectiva més global, més enllà de la llengua»

Sandra Vives

Peranto, membre de la junta de KEA



En una societat sotmesa a la cultura de la immediatesa i on ens quedem tranquils fent un activisme de repiulada a través del mòbil, no és fàcil trobar persones actives en moviments socials, capaces de sortir al carrer a manifestar-se i protestar pels seus ideals. Ja que la conec personalment, us diré que no és difícil admirar la Carol per la seva valentia i congruència. Espero traslladar-vos el poder de l'associació on està compromesa a través d'aquesta entrevista.

Com va ser el teu primer contacte amb l'esperanto, com el vas descobrir i què et va motivar i atraure de la llengua?

Vaig conèixer l'esperanto quan em vaig unir al moviment anarquista als vint anys. Era un element present com una idea afí, com el naturisme o el vegetarianisme, però no coneixia ningú que el parlés. Anys després em van regalar un mètode d'aprenentatge que vaig completar amb molt

d'entusiasme, però malauradament no vaig tenir l'oportunitat de practicar-lo, així que ho vaig deixar de banda durant molts anys. Al 2021 vaig reprendre el mateix llibre, i vaig contactar amb el grup esperantista de Tarragona i persones de Barcelona. A través d'Internet vaig fer amistat amb esperantistes estrangers i vaig integrar l'esperanto a la meua vida.

Hi ha una connexió especial entre els teus ideals anarquistes i el teu interès per la llengua? Ens vols explicar alguna cosa sobre la teua vida d'anarquista?

El meu interès per l'anarquisme va néixer quan en vaig sentir a parlar a l'escola. No em va semblar la ideologia més factible però sí la més bonica, ja que promou un canvi radical en la forma en què percebem la societat i les relacions humanes. A Tarragona, vaig entrar en contacte amb l'Ateneu Llibertari i em vaig implicar en les Joventuts Llibertàries. La Federació Ibèrica de Joventuts Llibertàries era una de les organitzacions històriques del moviment anarquista a la península i vaig ser militant d'aquest moviment durant aproximadament deu anys. A través de l'anarquisme, vaig aprendre una nova manera de pensar i de prendre decisions col·lectives, i vaig participar en trobades que em van enriquir enormement. Imagino que una llengua internacional comuna era una necessitat palpable als congressos internacionals del passat, perquè les llengües nacionals creen barreres segons la capacitat dels parlants. Ja que l'esperanto estimula la comunicació i la comprensió entre persones de diferents cultures, per mi s'ajusta perfectament als valors de l'anarquisme i és una eina accessible per a tothom. Tant l'anarquisme com l'esperanto són realitats existents perquè hi ha persones que les viuen, però al mateix temps també són utopies. Crec que és important mante-

nir-los com a objectius a l'horitzó; viure'ls pot transformar la teua vida, i encara que no canviïn el món, poden canviar-te a tu.

Fa uns mesos, tu i les teves companyes vaueu inaugurar l'associació La Gata Insubmisa a Tarragona per oferir un lloc de trobada i difondre uns valors concrets. Com va sorgir el projecte?

